

oktobro 1971

64-a jaro

n-ro 790 (10)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



TEJO
aktivas

Vi trovos

en tiu ĉi numero, escepte de la ekstra spaco dediĉita al la junularo, laŭeble varian kunmetaĵon, kompanse pro la forta kongresa akcento de la septembra numero.

Nia oktobra numero aperas en duobla kvanto. Tio estas parto de nova varbo-kampanjo ĵus lanĉita, kaj ni esperas, ke pro tio la legantoj bonvolos pardoni la malgrandan malfruigon, kiun tiu escepte granda eldonkvanto kaŭzis en la presejo kaj ekspedejo.

Enhavo

- 161 Faru vian hejmon centro de interŝanĝoj (Winkler)
- 162 Bojkoto de fremdaj lingvoj en Libio
- 162 Novaj kontaktoj kun Ĉina Esperanto-Ligo
- 163 Metamorfozo (Tyblewski)
- 163 Ĉu denove lingva baro kostis homajn vivojn aere?
- 165 Sarmente el la vivo (Miyamoto)
- 166 Recenzoj
- 168 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 168 Sagaca monaĥo kaj kuba harpisto
- 168 Kultura aŭtonomio atingota en Belgujo (citaĵo)
- 169 Ĉu "ali"-vortoj rajtas viciĝi en la tabelo de la korelativoj? (Gilles/Tvarožek)
- 172 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 174 TEJO-paĝo: La 27a IJK; La junulara tago de la 56a UK
- 176 Leteroj de legantoj
- 176 Lingva baro en IHEU (citaĵo)
- 177 Komenco bona — ĉio bona
- 178 Esperanto en radio
- 178 Nekrologoj
- 179 Oficiala informilo: n-ro 449
- 179 La makedona lingvo = bulgara dialekto ? (citaĵo)
- 180 Anoncetoj

La kovrilo

Freŝan entuziasmon disradias la TEJO-giĉeto en la kongresejo de la 56a UK en Londono. La slogano "TEJO bezonas VIN" atestas, ke nia junulara sekcio frontas la saman problemon, kiel UEA mem: kiel kreskigi la membronombron? Tamen la abonantaro de 'Kontakt' preskaŭ duobliĝis en la lastaj du jaroj; la regiona agado de TEJO jam donas fruktojn en novaj teritorioj; la kontaktoj kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj kondukis TEJO al tre prestiĝa pozicio inter ili; kaj la gejunuloj havas ankoraŭ aliajn rezultojn, pro kiuj ili rajtas esti optimismaj. Nun, kiam UEA kaj TEJO diskutas pri nova projekto pri la estontaj interrilatoj, vi povas legi sur p. 161 pri la Pasporta Servo nun organizita de Georg Winkler (dekstre sur foto) kaj sur p. 174-5 pri la TEJO-aranĝoj ĵus pasintaj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zel-do 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Uzo., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld. **Anonc-tarifo:** 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Faru vian hejmon centro de interŝanĝoj

— Pasporta Servo de TEJO

GEORG D. WINKLER

En la aprila numero de tiu ĉi revuo ni legis grandan artikolon de s-ro Carlén pri "Monda Turismo". Mi samopinias kun li, ke la turismo estas verŝajne unu el la plej gravaj kampoj de nia publika laboro por Esperanto, kie ni povas videbligi la grandan valoron de nia ŝatata komuna lingvo.

Ankaŭ la junulara sekcio de UEA, TEJO, laboras de longe sur la sama kampo, i.a. per sia Pasporta Servo, eble pli konata laŭ la malnova nomo Programo Pasporto, servo prizorganta por junaj esperantist(in)oj senpagan gastigadon fare de eksterlandaj geamikoj en ties propraj hejmoj.

Tian bonan ideon, komence sub la nomo "gastigfamilioj", havis en 1966 d-ro Rubén Feldman-González, prezidanto de la argentina esperantista junulara organizaĵo, kiu en 1967, helpe de siaj junaj argentinaroj kaj brazilaj kunlaborantoj, eldonis sesfolian informbroŝuron. En 1968, finfine la intertempe de TEJO oficialigita Programo Pasporto ekfunkciis: la unuaj interŝanĝoj okazis.

"Ĉiu afero havas du flankojn"

Ja estis bonega la ideo de d-ro Feldman-González: gastiganto certigis al gasto tranoktadon, ĉiujn manĝojn kaj baze necesajn elspezojn, kio evidente ebligis al juna gast(in)o dum sia eksterlanda restado havi tute senprobleman kaj senkostan vivon, t.e. sufiĉe bona oferto al ĉiu juna malriĉul(in)o.

Sed memkompreneble ĉiu afero havas du flankojn: iu programo, kiu estas favora al gasto, sekve devas esti iel malfavora al gastiganto; kaj tio estis la granda problemo: multaj geamikoj skribis klarigante: ni volonte gastigus amikon, tamen ni ne estas tiel riĉaj, ke ni povus certigi al gasto ankaŭ la manĝojn; eble mi ankoraŭ aldonu, ke temis ĝenerale pri relative longaj restadoj. Tio signifis, ke estis vere altaj la kostoj por la gastiganto. Do sekve ankaŭ la sukceso de Programo Pasporto restis sufiĉe modesta: oni forsendis du eldonojn de la pasporta broŝuro, po mil ekz-roj; tamen laŭ la tria jarraporto de Programo Pasporto, de 31.12.1970 disponeblis: 49 gastigofertoj el 17 landoj kaj 3 kontinentoj.

Do evidentiĝis, ke iu vigliganta ŝanĝo estis forte bezonata kaj necesa; Pasporto devis esti pliaktualigita kaj reformita.

Reformita pasporta servo

Tion mi faris helpe de mia hejma R.E.J. (Ruhr-a Esperantista Junularo, 329 membroj), junulara organizaĵo de la lando de la germana rivero "Ruhr", t.e. la pro sia industrio sufiĉe konata centra parto de la FRG-a "lando" Nordrejnvestfalio.

Precipe la devigaj kondiĉoj estis tute ŝanĝitaj: Ni ne plu demandas: "Kiu pretas senrekompence gastigi kaj manĝigi eksterlandajn junajn geesperantistojn dum ia longa tempo?". Nun la pasporta demando estas: "Ĉu ankaŭ vi pretas iel tranoktigi eksterlandan amik(in)on por almenaŭ du noktoj?", kaj ĉiam mi aldonas, ke "ĉia helpo gravas".

Por eŭropano ankaŭ dunokta gastigoferto povas signifigi bonegan avantaĝon, ekz-e se svedo, vizitante la eŭropan sudon, traveturas Germanujon, por li verŝajne du kromaj noktoj en Hamburgo certe estus bonvenaj. Same hispanino survoje al Britujo volonte akceptus kelkajn tagojn pasigotajn en norda Francujo, ĉu ne? — En Eŭropo la distancoj estas tiel malgrandaj, ke oni nepre survoje aldonu geamikan viziton. Cetere ŝajnas al mi sufiĉe grava argumento, ke ankaŭ se oni havus la monon por pagi eksterlandan restadon, la loĝado ĉe esperantista amik(in)o ĉiam estas preferinda, ĉar nur tio vere helpas al interkonatiĝo interamika kaj ĉiam donos al eksterlanda gasto la eblecon ekkoni ne nur la turismajn flankojn, sed ankaŭ la ĝeneralajn ĉiutagajn devojn kaj kondiĉojn enlandajn. Nelaste la homojn tie, — en nia speciala kazo — la esperantlingvajn geamikojn!

Jam pli ol 8 centoj da gastigofertoj

Momente fortege ni batalas por la starigo de vere granda kaj bonfunkcia gastiganta reto, ĉar ĝi ja estas la bazo de tiuj ideoj niaj. Do intertempe ni jam forsendis plurajn milojn da informiloj kaj gastigaliĝiloj, entute ili estos po dekmil; ankaŭ la reto jam sufiĉe kreskis: nun ni disponas pl. ol 8 centojn da gastigofertoj. Tamen tiu ĉi kuraĝiga sukceso tute ne sufiĉas, se oni konsideras, ke ĝis nun aliĝis geamikoj el entute nur 44 landoj, do ankoraŭ multaj mankas. Krom gastigantoj ni ankaŭ bezonas agemajn landajn kaj regionajn kunlaborantojn, — do se vi povus iel helpe kontribui al nia sukceso, mi korege petus vin tuj skribi al ni. La adreso estas: R.E.J. — G.D. Winkler, Pasporta Servo de TEJO, D-42 OB-Sterkrade, Jaegerstr. 27, F.R. Germanujo. (Bv. aldoni 1 internacian respondkuponon.)

Aliĝontoj bonvolu aldoni la nomojn, adresojn kaj aĝojn de siaj familianoj, ĉu temas pri oferto de nura tranoktado, tranoktado + matenmanĝo, tranoktado + ĉiuj manĝoj, maksimuma daŭro, maksimuma nombro de gastoj, ties preferataj aĝo kaj sekso. Lasta peto: ankaŭ se vi persone ne povas aktive kontribui al la gastiganta reto, bonvolu almenaŭ diskonigi la ideon inter viaj geamikoj.

Grava atentigo: nenies adresojn ni publikigos. Nur post via "jes" al gasto li havos ĝin.

BOJKOTO DE FREMDAJ LINGVOJ EN LIBIO

Post longaj periodoj de regado fare de Turkujo, Italujo kaj (1942-1951) Britujo kaj Francujo, la nordafrika ŝtato Libio atingis sendependecon laŭ siatempa rezolucio de Unuiĝintaj Nacioj. Revolucio en la fino de 1969 estis direktita interalie kontraŭ fremdaj influoj, kaj la registaro deklaris bojkoton kontraŭ fremdaj lingvoj, precipe la angla. Ĉiuj publikaj surskriboj fariĝis arablingvaj. Konforme al tiu politiko, italaj kaj hebreaj enloĝantoj devis forlasi la landon en 1970, kaj la eblecoj por eksterlandanoj labori en Libio estas nun forte limigitaj.

Nia korespondanto en Tripolio raportas, ke la bojkoto al fremdaj lingvoj montriĝis parte maltrafa, sed ke aliflanke ĝi havis gravajn eĥojn.

Antaŭ la revolucio, la angla lingvo estis la lingvo plej uzata en la registaro, en komercaj kompanioj, en la lernejoj kaj en reklamado. Oni povus diri, ke Libio estis araba nur laŭnome, kaj tio estis la vera motivo de la bojkoto kontraŭ la angla.

Post la revoluciaj dekretoj, ĉie oni vidis nur la araban lingvon en publikaj surskriboj: nomoj de butikoj, teatroj, bankoj, kinejoj — ĝis reklamoj pri la enlande produktata Coca Cola. Turistoj, sen scio pri la araba skribo, eĉ ne sukcesis trovi la ĉefajn hotelojn kaj bankojn. Ĉesis la instruado de la angla lingvo en la unuagradaj lernejoj. Lernejoj fremdlingvaj fermis siajn pordojn.

Hodiaŭ, preskaŭ du jarojn post la revolucio, la angla lingvo ankoraŭ restas la ĉefa lingvo uzata de la naftokompanioj. Fremdaj vortoj ankoraŭ abundas en la parolata araba lingvo. Ĵurnaloj kaj gazetoj ankoraŭ uzas la anglan por anoncoj. La angla estas ankoraŭ la ĉefa lingvo en la Universitato de Libio. En Tripolio oni trovas eĉ ne unu libian literaturan gazeton, kiu havus la taskon konservi kaj evoluigi la araban lingvon.

La bojkoto kontraŭ la angla lingvo malsukcesis unuavice ĉar ĝi atakis la lingvan formon, ne ŝanĝante aŭ

ne komprenante la realaĵon malantaŭ la lingva formo. La lingvan situacion simbole prezentas aŭtomobilo, kiu havas araban nomon, sed estas fabrikita en Usono.

Malgraŭ ĉio ĉi, restas unu esenca punkto: la libianoj entuziasmiĝis por la bojkoto, kaj ĝi kreas grandan lingvan vakuumon en Libio, kiu fine devas efiki favore al la ŝancoj de neŭtrala internacia lingvo.

Novaj kontaktoj kun Ĉina Esperanto-Ligo

Oni malofte aŭdas ion pri la Esperanta agado en Ĉinujo, malgraŭ la regula aperado de *El popola Ĉinio*. Tamen, ĝia julia numero de ĉi tiu jaro kaj la septembra numero (1971) de la organo de la Esperanto-Societo de Turku ambaŭ kune raportas la amikecan renkontiĝon de du finnaj esperantistoj kun la laborantoj de la redakcio de *El Popola Ĉinio*, de la Fremdlingva Eldonejo en Pekino kaj de la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo.

La du finnoj vizitis Ĉinujojn kun la karavano de Finnlanda-Ĉina Amikeca Societo, en la pasinta majo. Ne nur tio, ke ilia vizito ĝojigis la ĉinajn Esperanto-laborantojn, sed estis ankaŭ aliaj fruktoj...

La gvidantino de la finna karavano unuafoje aŭdis pri Esperanto en Pekino, kaj organizis — post reveno — 4-tagan ekspozicion en la Universitato de Turku (Finnlando) pri la hodiaŭa Ĉinujo, kaj montris i.a. esperantaĵojn, inkluzive de ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj.

Espereble en la Amikeca Societo kreskos la intereso kaj la atento pri la funkciado de la Internacia Lingvo, kiuj estis plantitaj de la renkontiĝo de la du finnaj esperantistoj kun la ĉinaj.



Ahto Linja (meze en la foto) kaj Martti Leinonen (apud li) partoprenis viziton de Finnlanda-Ĉina Societo al Pekino en majo. Tie ili ĝuis interalie tetrinkadon kun anoj de la redakcio de *El Popola Ĉinio*, Ĉina Esperanto-Ligo kaj Fremdlingva Eldonejo.



T. Tyblewski

METAMOR-FOZO

T. TYBLEWSKI

“Metamorfozo” povas ŝajni al kelkaj legantoj senforma sonĝo de esperantista papilio. Reale, ĝi estas unika provo de akre-vida introspektanto, analizi sian intelektan evoluon kaj la rolon de la Internacia Lingvo en tiu disvolviĝo.

La ebenoza regiono, kvankam ampleksa surface, dotita de la naturo per fekunda tero, signifoplena por mia lando jam en la embria etapo de ĝia ŝtata ekzisto; la regiono, en kiu mi travivis la 13 unuajn jarojn plenigitajn kronologie per ludado, militaj angoroj kaj intensa lernado inter la homoj etburĝe pedantaj kaj minace senfantaziaj, inter humidaj herbejoj, larĝaj kampoj, altesveltaj poploj kaj plorsalikoj super torfejoj; la regiono, kie hejme mi parolis per misinteligentula lingvo, sed ekster la hejmo ĝuis dialektan

babiladon kun samaĝanoj; la regiono, en kiu mi naskiĝis, kvankam rememorata sentimente, ne estas tero de mia amo.

Dum postmilita migrado mi venis en alian regionon, kie kontraste la okuloj ĉiudirekte renkontas ĉarmon de la montoza pejzaĝo, kie la karakteriza montopinto dominas ne nur figure, sed ankaŭ per la severa, preskaŭ arkta klimato; kie diversoriginaj alvenintoj intermiksiĝis dialekte, more, kulture; kie inter la montovojoj, deklivoj, abunda rokaro kaj pigmeaj pinoj ekis mia admiro por la belo de la naturo; kie la rava juneco de mia korpo permesis al mi ekkoni la ekstazon de amo; kie maturiĝante mi neatendite ekaŭdis la vorton ‘Esperanto’ kaj ekde tiu tempo eniris la vojon de evoluo – ĉi tiun teron mi amas.

Ludi, lerni, labori, studi kaj denove studi, por spertadi diversajn flankojn de la vivo – jen la taskoj de la homo. Plenumante la taskojn ne ĉiuj bonŝancas renkonti la celon, kiu al ilia peno donas la obligitan ĝuon de la intensa partoprenado. Mi konas tian ĝuon, mi renkontis la celon; mi eliris, malgraŭ ĉiaj tentoj resti, el la konscia regioneco.

Leviĝu el la nacia konscio

La lando, en kiu mi vivas, jam de jarcentoj apartenas al eŭropa kulturo; la nacio, al kiu mi fiere apartenas, ne facile defendadis sian sendependecon, memstaron kaj liberon; la popolo, el kiu fluas la vivodona forto, donis al la mondo kelkajn geniulojn, kiujn admiras reprezentantoj de ĉiuj rasoj, religioj, politikaj konvinkoj, ĉar la genieco estiĝis aprobita valoro de la monda kulturtrezoro. La longa historio de mia nacio kaj lando; la granda heredaĵo, kiun ricevis ankaŭ mi, kaŭzas tamen, ke ne estas facile resti nacio sendolore, senzorge, sentime, ĉar minacas al ĝi danĝeroj oblespecaj. La internaj – pro la historiaj komplikoj, kiuj karakterizas la naciojn en ilia emaro; la eksteraj, kiuj neunufte enskribis en nian historion tragikan epizodon.

La nacia konscion mi akiris maldolĉe jam en infanaĝo, kiam malamiko kun tuta brutaleco insistis ekstermi la homojn de mia lingvo, moro kaj tradicio. La maldolĉon forigis ĝojo pro reakirita libero kaj espero pluvivi sekure en la ordo garantianta pacon. En la paca lando ni ne evitis la malbonon de la homa senrespondeco, malhonesteco, krimemo. Tial mian nacikonscion samtempe priradiis la gloro de grandiozaj atingoj kaj makulis la lamaĵoj de la socia vivo. Kun ĉio ĉi mi estiĝis homo kultura, klera, estiminda, kiun oni emas imiti aŭ de kiu oni volonte ĉerpas modelon de siaj faroj. Strebante al la sferoj de la intelekta kaj morala perfektecoj, mi kulturis la Internacian Lingvon, ĉar ĝi estis por mi la ŝanco kompensi tiujn mankojn, kiujn mi kvazaŭ heredis naskiĝinte en difinita loko de Eŭropo aŭ – eble pli racie – ĉar mi konsideris la lingvon loga rimedo kontakti kun la riĉega fonto de la plej diversaj esencoj, kiajn al la individuo povas liveri maksimume diversgentaj, nesamtipaj – aliaj homoj.

De la unuaj kortuŝoj pro alveno de la leteroj el fremdaj landoj, tra la ekscitoj de unua konversacio kun korespondaj amikoj el Svedujo kaj Italujo, ĝis la emocioj de prelegado kaj verkado en Esperanto – mi paŝis al pli supraj tavoloj de la konscio. La novaj tra-

Ĉu denove lingva baro kostis homajn vivojn aere?

En la fono de la aviadila akcidento de la ‘Orientazia Japania Aerlinio’ (en julio 1971), kiu kostis la vivon de pli ol 60 personoj, estis i.a. – onidire – la grava lingva problemo. Kvankam la ĉefpiloto estis japana, la aviadilon gvidis vicpiloto, kiu estis dungita el la eksterlando kaj studanta la ĉefpilotajn taskojn sur la seĝo de la ĉefpiloto.


Nuntempe laboras 169 pilotoj dungitaj el la eksterlando en ‘Japania Aerlinio’ kaj 29 en ‘Tutjapana Aerlinio’. Kiam la Tutjapana Aerlinio intencis dungi centon da pilotoj el la eksterlando en 1969, la sindikato de ĝiaj pilotoj forte kontraŭis tion por ‘sekureco’. Pro la diferencoj de la lingvoj kaj kutimoj, en tia internacia aviada kunlaboro, mankas necesa solidareco precipe en krizaj kazoj – tio estis la opinio de la sindikato.

Dum la nombro de la aviadilaj pasaĝeroj ĉiam pli kaj pli kreskas kaj dum oni ne povas eviti la internaciigon en tia sfero, kiel oni solvus la problemon sen serioza konsidero pri la lingva baro?

METAMORFOZO

(daŭrigo de p. 163)

**“Ĉi tiun teron mi amas”
— pola pejzaĝo fotita
de Tadeusz Kowalski.**



vivaĵoj signis en mia psiko neforigeblajn spurojn, kiuj transformiĝis en aparte nedifineblajn valorojn — en la povon vidi aferojn nove, alimaniere, pli amplekse. Pasis jaroj, antaŭ ol mi konstatis, ke la pli-ampleksigo signifas neeviteblan internaciecigon de la pritaksado.

Senti superregione ...

Sidante nun ĉe la skribotablo, mi meditas pri la procezo, dank' al kiu la estinta regionano, parolinta dialekto kaj vidinta la fenomenojn de la vivo nur ere, estiĝis membro de la nacio, povanta senti superregione, kapabla pensi pri problemoj de la amata lando kritike kaj admire, inklina konsili al la ŝtatestroj la reĝoŝanĝojn, por objektivisma profito de la nacio; mi meditas ankaŭ kiel esprimiĝas la plej supera tavolo de mia konscio — la internaciismo.

Ĉu per tio, ke mi kapablas komponi lertan leteron al gekorespondantoj? Ĉu en tio, ke mi scipovas babili dum Universala Kongreso pri temoj ekstreme facilaj kaj ekstreme komplikaj? Ĉu en la povo facile kontakti kun la civitanoj de la plej diferencaj landoj de la mondo? Aŭ en tio, ke mi ekposedis kuraĝon publike opinii, eĉ spite al la ĝenerala konsidero? Aŭ per la preteco agi kaj ne postuli la profiton nur por mi? ...

Ne, la jesa respondo je ĉiuj starigitaj demandoj ne difinus mian subjektivan internaciismon, posedatan por propra uzo. Kio do estas ĝi kaj kia? Mi devas trovi la respondon, ĉar sen ĝi turmentos min la dubo: kial mi estas diferenca de la anoj de mia medio kaj kial ili volus esti similaj al mi aŭ... neniigi la forlogindan modelon?

Ĉu la fakto mem, ke iun tagon mi decidis partopreni la kurson de Esperanto kaj fininte ĝin ekkuraĝis fremdlingve paroli? ... Ne, kvankam ĝi certe estis la signifa komenco.

Ekipita per la escepta rimedo, mi povus ja pseŭdoprofiti ĝin same kiel faras tion la miloj — korespondante, babilante, uzante internaciajn sloganojn en Internacia Lingvo, sed restante senŝanĝaj provincajnoj de sia propra spirito... Mi penas nun. Kiel malfacile ekspliki la ŝajne simplan aferon! Ĉu ne estas aŭdaco ekspliki ion, kies nur konturon oni rimarkas? Mi aŭdace provas.

La internaciismo, kiu plenigas min, ne estas fenomeno, kiun mi povus science difini. Mi povas tamen

prezenti ĝin per priparoloj aŭ komparoj, esprimi ĝin metafore. La internaciismo, al kiu mi estas obea, devigas ĉiam elekti el inter kelkaj ebloj de la solvo. Se la elekto dependas nur de mi, ĝi okazas jene: en la dilemo, kiel fari, mi decidas uzi manieron, kies efiko estas la profito ne nur mia. Ĝi estas batalo kontraŭ potenca egoismo, kiu ĉiam kvazaŭ atendas sian venkoŝancon. Farinte tiel mi ne proklamas la noblan agon, kvankam la tento insistas senĉese. La principo, kiun mi klopodas apliki, fidele tekstas: antaŭ ol esti internacia, mi estu interhoma. La principo devigas pritaksadi kritike tion, kion mi reprezentas per mi mem. Dubi pri mia klero, dubi pri mia justemo, ne fidi al propra prudento, timi la inklinojn fari pli facile — jen la tasko, kiun mi klopodas plenumi. Se mi sukcesas, la paŝo al internaciismo estas jam farita. La transiro al ĉi tiu supera tavolo de konscio ne okazus sen la peno lerni kaj studi, sen la streĉo konstante memlerni. Ĉion, ĉie, ĉiel. Agnoski iun aŭ ion kiel la modelon, ekkoni kaj imiti; se eble perfektigi — jen la alia tasko de internaciisto.

Ne rikolti facilajn fruktojn de pseŭdosukcesoj, ne raviĝi pro flataro, sed dubi kaj malkontentemi pri si mem, entreprenante ĉion por proksimiĝi al la kontento.

Interkompreniĝi ne sufiĉas

Estis tempo, kiam — konsiderinte min esperantisto — mi ekfieris pro la granda atingo: jen mi povas interkompreniĝi kun la tuta mondo! Sed poste aperis la dubo: kion proponi por la interkompreniĝo?

Ĉu sufiĉos tio, kion mi scias? Malfacile, longdaŭre formiĝadis la konkludo: esti esperantisto ne samsencas esti internaciisto. La unua vorto indikas ja sciopovon intelektan, la dua — la kvaliton psikan. Por ilin kunigi oni devas entrepreni penan, ravan agadon.

La favorema najbarino jam demandis min: 'Kion donas al vi Esperanto?'. Tiam mi menciadis al ŝi ĉiujn plej logajn profitojn. Sed nun mi respondus, ke la plej alta profito, kiun mi ekposedis per Esperanto estas la skalo vidi aferojn, la amplekso pritaksi problemojn — de la regiona ĝis la internacieca. Ĝi estas la metamorfozo, dank' al kiu mi sentas mian homecon plene, super la obstakloj de superstiĉoj. La mezurilo de aferoj posedata de mi logas la plej klerajn anojn de mia medio. Eble do mi mezuras vastaskale?

SARMENTE EL LA VIVO

MIYAMOTO MASAO

Belarta Konkurso 1971
Originala poezio
3a premio



Meze: la aŭtoro Miyamoto masao

La stilo de ĉi tiu poemo originas jam de la 8a jarcento en Japanujo. Ĝi havas formon de babilado de pluraj personoj, konsistanta el ĉeno da versoj, kiuj havas 17 silabojn (5-7-5) kaj 14 silabojn (7-7) alterne. En la floranta epoko de la ĉenpoezio – jam pasinta – la nombro de la ĉen-versaĵoj ofte atingis centon. Oni legu ĉi tiujn parolojn de tri anonimuloj po du versaĵoj de 17 kaj 14 silaboj kombine.

La aŭtoro, 58-jara, jam de longe aktivas kiel eldonisto-verkisto-tradukisto en la Esperanto-literaturo. La vorto “sarmiento”, uzata en la titolo, signifas volvan grimpotigon, precipe vitan.

<i>De sud' mesaĝo</i>		<i>sur seĝ' apuda</i>		<i>ĉu viv' eternas?</i>	
<i>per hela briz' atingas</i>		<i>en bus' pejzaĝon gapas</i>		<i>sur mont' dezerta ree</i>	
<i>ĝis marta plaĝo;</i>	(A)	<i>l' edzin' jam muta;</i>	(A)	<i>verdet' sin sternas;</i>	(A)
<i>pro juno senrevena</i>		<i>sakuroj en nebulo</i>		<i>pro mond' sovaĝa tigre</i>	
<i>dolor' la koron klingas;</i>	(B)	<i>ĉu al ŝi okulfrapas?</i>	(B)	<i>mi volas muĝi vee;</i>	(B)
<i>pli kreskis splena</i>		<i>antaŭ spegulo</i>		<i>mi lamas migre</i>	
<i>sopir' en mi latente</i>		<i>ŝtelvene mi eksidas,</i>		<i>sub pluv' printempa, noktos</i>	
<i>ĝis hor' matena;</i>	(C)	<i>ha, povra ulo!</i>	(C)	<i>tuj baldaŭ nigre;</i>	(C)
<i>kun lumo de futuro</i>		<i>post vivmizero fata</i>		<i>nur koro de l' amiko</i>	
<i>tuj venos freŝ' envente;</i>	(A)	<i>eĉ larmojn mi ne vidas;</i>	(A)	<i>al ĝojo min adoptos;</i>	(A)
<i>min frapas muro</i>		<i>de l' sort' batata</i>		<i>batbatas liko</i>	
<i>per sia blank', probable,</i>		<i>ŝi perdis du infanojn,</i>		<i>de pluv' gutgute pelvon</i>	
<i>de novriĉulo;</i>	(B)	<i>kaj viv' kotvada;</i>	(B)	<i>— sen romantiko!</i>	(B)
<i>verŝiĝas junaj larmoj,</i>		<i>al la ĉiel' obtuza</i>		<i>deprimas monotona</i>	
<i>kankreto iras krable;</i>	(C)	<i>etendis ŝi la manojn;</i>	(C)	<i>reson' al Muzo servon;</i>	(C)
<i>sur strando palmoj</i>		<i>torento flusa</i>		<i>kun pec' limona</i>	
<i>sub sun' tropika verdas,</i>		<i>ŝaŭmondas tra l' markolo</i>		<i>tro luksas teo ĉe mi</i>	
<i>jen fiŝo-svarmoj;</i>	(A)	<i>en bluo prusa;</i>	(A)	<i>en tag' senmona;</i>	(A)
<i>ĉu nostalgie ili</i>		<i>en viv-vojaĝ' mi sole</i>		<i>ankoraŭ daŭre pluvas,</i>	
<i>pri fora viv' koncertas?</i>	(B)	<i>sub la ĉiel-kupolo;</i>	(B)	<i>ĉu oni finis semi?</i>	(B)
<i>sen ĝen' babili,</i>		<i>frutempas fole</i>		<i>l' edzin' nun stufas,</i>	
<i>sopiri, revu amon,</i>		<i>rozeto ĉe ruino</i>		<i>pri kareriz' vespera</i>	
<i>kaj plu jubili;</i>	(C)	<i>por mi konsole;</i>	(C)	<i>l'odoro pruvas;</i>	(C)
<i>per sorĉa bril' la luno</i>		<i>sufloras ĉion vanta</i>		<i>plafone lampo brilas,</i>	
<i>instigas amorflamon;</i>	(A)	<i>ventosusur' ĉe pino;</i>	(A)	<i>al mi salut' tenera;</i>	(A)
<i>jonkvil' sub lumo</i>		<i>vortic' kirlanta</i>		<i>ve, mi similas</i>	
<i>ridetas sur ĉi klifo,</i>		<i>fluadas antaŭ vido,</i>		<i>al hund' venkita, kiu</i>	
<i>en blu' laguno;</i>	(B)	<i>rivero granda;</i>	(B)	<i>sub pluv' lamiras;</i>	(B)
<i>ĉu al hejmbordo suda</i>		<i>nun silka pluv' enfermas</i>		<i>almenaŭ en la koro</i>	
<i>sopiras vi, zizifo?</i>	(C)	<i>l' animon en livido;</i>	(C)	<i>stimule hel' radiu!</i>	(C)

Historio de Vjetnamujo — facile legebla

Recenzas David K. Jordan (Usono):

La tradicia Vjetnamio: kelkaj historiaj etapoj. Red. Nguyen Khac Vien. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1970. 170 p. 19 cm.

Interesa kaj legebla enkonduko al historio de fascina lando estas ĉi tiu libreto redaktita de Nguyen Khac Vien kaj eldonita en pluraj lingvoj. La verkin-toj priskribas vjetnaman historion ekde la plej antik-vaj tempoj arkeologie konataj ĝis la franca konkero de 1858. Ili penas prezenti kaj disvolvon de sociaj kaj kulturaj aferoj kaj progreson de politikaj eventoj. En la sama libro la leganto ekkonas la militan hero-on Nguyen Hue (kiu en la 18a jarcento reunuigis la landon, rezistis invadon el Siamo, elpelis ĉinajn arm-eojn de la Ĉing-dinastio, kaj fondis modernecajn ag-rikulturajn reformojn), la saĝulon Nguyen Binh Khi-em (kiu en la 16a jarcento retiriĝis en monaĥejon, kie tamen lin serĉis reĝoj kun demandoj pri regado) kaj la antikvajn historiistojn de la dinastioj Ly kaj

Tran. Oni legas kaj pri interfrataj militoj kaj pri an-tikva agrikulturo kaj pri la historio de budhismaj temploj. Kvankam ĝi estas fakte nur aro de individu-aj eseoj, la libron oni facile legas kiel unuecan histor-ion, pro la speciala talentpleneco de la redaktisto.

La tradicia Vjetnamio ne estas verko tute senmakula. Ĝi tute ne priskribas epokon de ĉina influo antaŭ la 11a jarcento, sed evidente sen kompreno de tia inf-luo oni malfacile komprenas sekvajn vjetnamajn in-stituciojn. Kaj ĝi uzas jam eluzitajn arkeologiajn fak-vortojn kiel "bronzepoko" kaj "paleolitiko" jen kiel nivelojn de teknika evoluo, jen kiel tempopunktojn aŭ epokojn. Kiel postparolo (presita per kursivaj li-teroj) la "konkludoj" reinterpreteblas la tutaĵon laŭ pli rigide ortodoksa politika teorio kaj rilate al la nun-epokaj luktoj en Vjetnamujo.

Min ĉi tiu alloga libreto enkondukis al tuta nova gru-po de interesplenaj temoj, kaj min ĝi lasis entuzias-ma plu lerni pri la tradicia vjetnama civilizacio. Mi forte ĝin rekomendas al ĉiu, kiu interesiĝas pri histo-rio aŭ pri Azio — do al ĉiu — kaj avida atendas plu-ajn tiajn librojn, aŭ de Vjetnamujo, aŭ de aliaj lan-doj.

Mendu ĉe UEA: 1,56 gld. (por Nederlando 1,63 gld.) + sendokostoj 10%.

Karnlingva Schwartz-aĵo

Recenzas William Auld (Skotlando):

Vole... Novele, de Raymond Schwartz. Kopenhago: Eldonejo TK, 1971. 192p., 21 cm.


Antaŭnelonge Rossetti prave atentigis, ke hodiaŭ oni ne konas "la karnan lingvon de Schwartz kaj la bildriĉan stilon de Hernandez"; la dua mondmilito "rabis preskaŭ la tutan lingvan kulturon de la inter-milita epoko 1918-1939". Ĝuste dum tiu epoko la proza stilo de Esperanto fariĝis vigla, flua, elasta kaj esprimiva, dank' al viva uzado fare de multnombraj proztalentoj. Hodiaŭ la sentema palato, kiu kutim-iĝis al tiaj ravaĵoj, sentas iom anonime sengusta la nunan prozstilon (pacon al la esceptoj!).

Ĝustamomente do aperas tiu ĉi kolekto de la nove-loj de unu el tiuj majstroj, la karnlingva Schwartz, kaj niaj legantoj povos konstati mem la mirindan es-primivon de lia lingva instrumento, kiu sen kompli-kaĵoj tamen profitas la semantikan freŝecon kaj gra-matikan klarecon de nia lingvo. En liaj rakontoj la homoj 'prezentiĝas en cindrulina tualetto', ili 'fluge diligentas', ili ne ĉiam 'diras' sed foje 'opinias', 'eka-tentas' aŭ 'sciavidas'. Ilia parolado spicas facilvi-glaj blasfemetoj kaj kolorplenaj epitetoj. Forestas ĉia peza maleleganteco. Eble niaj prozistoj trovos ĉi tie nutron kaj inspiron, urĝe bezonatajn.

Ĉu intereson nur lingvan posedas la volumo? Male!

La noveloj enhave ankaŭ viglas. Karakterizas ilin sprito, humuro kaj — de tempo al tempo — agrabla sentimento. Ili plaĉos al ĉiuj — ankaŭ al vi, mi ga-rantias.

Mendu ĉe UEA: 24,- gld. (por Nederlando 24,96 gld) + sendokostoj 10%.



Fidinda traduko el la poemoj de Heine


**Recenzas Reinhard Haupenthal (F.R. Germa-
nujo):**

Kantoj kaj romancoj; poemkolekto, de Heinrich Heine. El la germana trad. Gaston Waringhien kaj Kálmán Kalocsay. La Laguna: Régulo, 1971. 381 p. 23 cm. (Belliteratura serio 27-28.)

La klopodo rekrei en Esperanto la lirikon de Heine komenciĝis tuj post la apero de nia lingvo, kaj certe ne estas troigo, kiam oni asertas, ke Heine apartenas al la plej ŝatataj poetoj. Inter la tradukintoj, plej longe, plej sindone kaj plej sukcese laboris Kalocsay/Waringhien. Tion pravas tre konvinke la komparo in-ter ĉi tiu libra eldono kaj la pecoj antaŭe aperintaj en la gazetaro.

La leganto trovos en la komenco de la libro larĝan enkondukon, kiu konatigos lin kun la tempohistoria fono necesa por la kompreno de la poemoj de Heine. La diversaj etapoj en la vivo de Heine (1797—1856) estas enĉenigitaj en la historiajn kaj kulturajn even-tojn de la tempo. En aparta ĉapitro sekvas elpaŝo pri la tradukaj fortostreĉoj de la aŭtoroj.

La prezentata elekto mem aspektas jene: La verkon komencas *Libro de l' kantoj*. En ĝi la leonan parton tradukis Kalocsay. Sekvas elektoj el la *Novaj poemoj*, kiuj same devenas pliparte de Kalocsay. Waringhien transprenis anstataŭe *Germanio, Vintra fabelo*, dum



Atta Troll taskiĝis al Kalocsay. Partoj el *Versoj aktualaj*, *Romancero* kaj *Lamentadoj* finas la volumon.

Kvankam iuj detaloj de la originaloj perdiĝas en la tradukoj aŭ reaperas iom aliloke, oni povas diri, ke la tradukoj mirinde kontribuas al la kompreno de la origina senco. Plej grave: negermano dank' al tiuj tradukoj ne bezonas ŝvitakiri sciojn por aliri la originalojn.

Same kiel Kalocsay donacis al ni validajn tradukojn el Madach kaj Petőfi, el Dante, Shakespeare kaj Baudelaire, li nun liveras validajn, fidindajn kaj konvinkajn tradukojn el Heine, ĉiam fidela al la originala aparteco de la poeto.

Mendu ĉe UEA: Bind. 21,60 gld.; broŝ. 17,28 gld. (por Nederlando: bind. 22,47 gld., broŝ. 17,98 gld.) + sendokostoj 10%.

Pruvita sciencotaŭgeco

Recenzas Hans M. Maitzen (F.R. Germanujo):

Pri la kometo 1939 IV P/Väisälä; serĉefemerido por 1971-1972, Liisi Oterma. Turku: Astronomia-Optika Societo, 1970. 9 p. Ilus. 25 cm.

Kadre de granda planetetserĉprogramo inter 1935 kaj 1954 en Turku oni malkovris apud 800 planedetoj ankaŭ 6 kometojn, el inter ili tri periodajn. Unu el ili estas la objekto ĉi-tie prilaborita. La aŭtoro kalkulis baze de la observoj en la malkovrojaro 1939 efemeridon por retrovi la 10-jaran kometon 1949/50. Per nur unu observo je tiu tempo li korektis la orbiton por kalkuli la efemeridon por la reapero en 1959/60, kiam ĝi estis observita tre proksime al la kalkulita loko. La alproksimiĝo al Jupitero longigis la rivoluan tempon, tiel ke nun la kometo estas atendebla laŭ la kalkuloj de la aŭtoro nur en aŭtuno 1971, tamen sub malfavoraj poziciaj cirkonstancoj, due en nur 17m8-lumeco, kiu signifas observeblon nur per potencaj teleskopoj. Por tio estas donitaj la pozicioj kaj datoj.

Estas rimarkinde ke astronomo uzas la Internacian Lingvon por pure faka publikaĵo donante unuflanke bonan ekzemplon al la tute ne eta aro de astronomoj, aliflanke prezentante la eblecon fari kelkajn terminologiajn rimarkojn kaj diskutojn, kiujn mi ĉi tie ne povas ne mencii.

Unua problemo estas la vorto 'kometo' oficialigita en la Unua Aldono al la Fundamento. Pro analogio al 'planedo' mi forte pledas anstataŭigi ĝin per 'komedo'. La aŭtoro uzas 'planedeto' anstataŭ 'asteroido' zamenhofa. Tion oni povas laŭdi, ĉar ĝi sufiĉas komplete kaj la neologismo havas eĉ unu silabon pli. Same bona laŭ mi estas la uzo de 'orbiti', ne donita en PIV.

Sume oni povas nur gratuli la imitindan iniciaton de la aŭtoro, kiu pruvis, kiel sciencotaŭga estas la Internacia Lingvo.

Mendu ĉe UEA: 2,— gld. (por Nederlando 2,08 gld.) + sendokostoj 10%.

Donaco al birdamantoj

Recenzas O. Christensen (Danlando):

Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj. Nomenklatura Komisiono de la Ornitologia Rondo Esperantlingva. Cardiff (Kanado): Esperanto Press, 1971. 68 p. 16 cm. Ilus.

Estas por la recenzanto ege granda ĝojo sciigi al la naturamikoj la profundan plezuron, kiun li ekhavis, kiam fine tiu ĉi praktika nomaro de eŭropaj birdoj aperis. Por ornitologoj ĝi simple estas nepre bezonata. Iam mi estis la unua kaj ununura esperantista ornitologo registrita en UEA — kaj nun 200 membroj!

La interesiĝo pri la naturo estas nuntempe granda kaj precipe pri la birdoj, kiuj ĝojigas min per siaj ofte mirindaj voĉoj kaj buntaj plumvestoj. Dank' al diligenta personoj, precipe s-ro Ru Bossong, Eindhoven, Nederlando, ĉi tiu grandega laboro (centoj da horoj) finiĝis tiel sukcese. Interdiskuti pri birdspecoj nun estas facile por birdamantoj en la tuta Eŭropo.

Mi kore gratulas miajn ornitolog-kolegojn kaj rekomendas tiun libreton, kiu enhavas ankaŭ latinan indekson. La birdo-grupoj estas ordigitaj laŭ la sistemo de *Birdoj de Eŭropo*, ellaborita de Peterson, Mountfort, kaj Hollom.

Mendu ĉe UEA: 3,20 gld. (por Nederlando 3,33 gld.) + sendokostoj 10%.

Forigenda barokeco

Recenzas Manuel de Seabra (Portugalujo):

Esperanto-Português: Conversação, de Pandiá Pându. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1971. 672 p. 24 cm.

Kvankam ne ĉiam nediskutebla, la lingva kvalito de ĉi tiu libro estas sufiĉe altkvalita. Jen kompetenta verko, senhezite rekomendinda. Sed nepre riproĉenda la baroka, sentimentala etoso ĉe la portugallingvaj komentoj, krom la amatoreca presplanado. Se mi ne estus hardita esperantisto, tio neripareble forpelus min; montri ĉi libron al ne-esperantistoj povas plue senkreditigi la lingvon. Kiu povos ne ridi legante frazojn kiel: 'Kompreni Esperanton signifas esti tuŝata de la ekstazo de ĝia dia sintakso'? Jam tempas, ke oni ostracismu (kaj ne dum nur dek jaroj!) tiun rokkan stilon kaj la naivan senpretekstan uzadon de proverboj, kiuj, krome, en ĉi kazo, ofte malfaciligas la konsultadon de la libro, ĉar ili konfuze sin miksas ĉien, eĉ en la indeksojn.

Mi elkore deziras, ke ĉi tiu tre valora libro elĉerpiĝu rapide kaj eventualan duan eldonon pritraktu kompetenta profesiulo. Tiam, ĝia rolo por Esperanto en la portugallingvaj teritorioj povos esti vere grava.

Mendu ĉe UEA: 28,80 gld. (por Nederlando 29,95 gld.) + sendokostoj 10%.

Sprita prezento en eleganta lingvaĵo

Recenzas Anna Bajer-Dratwer (Israelo):

Nokto da timo, kaj aliaj noveloj, de Bertram Potts. Åbyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1971. 79 p. 21 cm.

Timiga titolo. Timiga pejzaĝo. Timiga tempo. Tiaj estas la eksteraj trajtoj de la unua novelo. En la lasta — agrabla renkontiĝo kun konataj en la Esperanto-movado nomoj kaj personoj. Kaj meze — en la formo de novelo — mallonga komedio-farso, preskaŭ videbla en teatro.

Tri noveloj — tri mondoj — tri agordoj. Ligas ilin viva emocio, vivaj karakteroj, sprita bonhumora prezento.

Kun daŭra intereso de la komenco ĝis la fino mi legis la tuton kaj ne malofte ridetis aplaŭde.

Bona ŝerco en la ĝenerale eleganta lingva vesto. La simpla esprim-maniero faciligas la legadon. La amuza libro legebla por ripozo, dum vojaĝo, se nur la mantelpoŝo povos "elteni" la larĝecon kaj longecon de la volumo kaj la dikecon de la paĝoj. Pro la enhavo valoras pligrandigi la poŝojn. Kelkaj preseraroj kaj lingvaj strangaĵoj ne tro ĝenas. [Tamen, kion signifas "garnizone vestita"? (p. 72). Ankaŭ ne "preskribto por malvarmumo", sed "preskribo". (p. 55).]

La plaĉan titolpaĝon desegnis G. Farrant.

La dediĉfrazoj simpatie prezentas ankaŭ la aŭtoron mem.

Mendu ĉe UEA: 5,— gld. (por Nederlando 5,20 gld.) + sendokostoj 10%.

LASTE APERIS . . .

Kosmoŝipo 'Edeno n-ro 5', La Konisi gaku. 46 p. 21 cm. 2,20 gld. Kvin originalaj sciencfikciaj rakontoj, verkita en 1963–65 de japana aŭtoro.

Landlimo jam pasis.... Yamada tempu. 16 p. Ilus. 19 cm. 1,20 gld. Hajkoj (17-silabaj poemetoj) originalaj kaj tradukitaj el japanaj poetoj de la 17a ĝis la nuna jarcentoj.

Ni ludas teatraĵojn E.V. Tvarožek. 31 p. 21 cm. 2,— gld. Kvar originalaj unuaktaĵoj de ĉeĥa aŭtoro, el kiuj du atingis sukcesojn en la Belartaj Konkursoj de 1969 kaj 1970. N-ro 4 en la serio *Gajaj Klubvesperoj*.

Reto, La Bukar. 32 p. 21 cm. 2,— gld. Originala teatraĵo surscenigita en Parizo en 1971, pri kripla virino, kiu provas sin liberigi el la reto de la patrino superregado.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

SAGACA MONAĤO kaj KUBA HARPISTO

Ĉu vi iam aĉetis skribmaŝinon? Se vi volis kontroli, ĉu ĉiuj literoj bone funkcias, kiel vi faris? Tajpistinoj kaj maŝinriparistoj en la anglalingvaj landoj kutimas uzi la tre koncizan (kaj sencohavan) frazeton **THE QUICK BROWN FOX JUMPS OVER THE LAZY DOG**, kiu enhavas ĉiun literon de la angla alfabeto minimume unu fojon. Tajpante tian frazon, oni tuj kontrolas, ĉu la klavoj bone funkcias dum normala uzado. Pro la senco (la rapida bruna vulpo transsaltas la pigran hundon), tiun frazeton oni facile memoras.

Jam ekzistas pluraj provoj de analoga frazo por la 28 literoj de la Esperanta alfabeto. En la hispana poŝvortaro de la eldonejo Sopena oni trovas: **KUBA HARPISTO ŜAJNIS AMUZIĜI FACILEGE ĈE VIA JAŬDA ĤORO**. Tiu frazo, iom arbitra laŭ enhavo(!), estas longa 55 literojn. Unu literon pli konciza, sed apenaŭ malpli fantazia, estas la frazo: **ŜAJNAS, KE LA SAGACA MONAĤO LAŬTVOĈE RIFUZADIS PREĜI SUR HERBAĴO**. Multe pli konciza kaj pli komprenebla frazo estas: **GEEDZIĜO: MONAĤECA ĴURO POST HELA ŜAŬMVINO KAJ FIDIBOĈO** (47 literoj). Sed ĉu tio estas konvena sentenco por instrui al tajpistinoj? La redakcio volonte publikigos pli bonajn proponojn.

Kultura aŭtonomio atingota en Belgujo

"La belga ministraro post plurhora interkonsiliĝado trovis solvojn por kelkaj problemoj.

Ili koncernas interalie la kulturen aŭtonomion, rilate al kiu oni trovis akordon pri la leĝ-proponoj pri la divido de la parlamentaj ĉambroj kaj senato laŭ lingvogrupoj* kaj pri la lingvo, en kiu komunum-konsilantoj devas ĵuri okaze de sia enoficiĝo.

Lastatempe okazis incidentoj pro tio, ke urbestroj de senmikse flandraj komunumoj rifuzis akcepti la ĵuron de novaj konsilantoj en la franca lingvo. La leĝpropono antaŭvidas, ke en unu-lingva regiono tiu ĵuro okazu en la loka lingvo."

— *NRC Handelsblad* (Nederlando), 4-5-1971

* En Belgujo, ĝenerale dirite, en la norda parto oni parolas la flandran lingvon kaj en la suda la francan. Krome en la parto apud F.R. Germanujo la germana lingvo estas parolata, kvankam ne larĝscale.

ĈU "ALI"-VORTOJ RAJTAS VICIĜI EN LA TABELO DE LA KORELATIVOJ?

Kvankam inter la komisiitoj de la Lingva Servo de UEA troviĝas pluraj akademianoj, estus iluzio supozi, ke ĝi ĉiam povas doni firman, senkompromisan kaj nerefuteble pravan respondon al ĉiu demando, kiun pafas al ĝi membroj. Ja ĉiam troviĝas kelkaj problemoj, pri kiuj la opinioj vaste varias, same en la sino de la Akademio, kiel inter la ĝenerala publiko. Se ne estus tiel, tiam ne necesus akademio kaj neniam okazus voĉdonoj por establi unuecan normon de la lingvo-uzo. Eble ankaŭ pri ĉi tiu temo necesus voĉdono?

"FALSAJ KORELATIVOJ" MALAPERU

Tre surprizis min la respondo de s-ro A.D. Atanasov, Lingva Servo, al la demando de s-ro C. Dominique, kiu estas publikigita en la novembra numero de *Esperanto* (1970).

Laŭ mia opinio la aserto de s-ro C. Dominique, ke "nenio logike kontraŭstaras" al la uzado de "aliu", "aliam" ks., estas erara. Mi konsilas al ĉiuj, kiujn tiu demando interesas — fakte ĝi estas grava demando! — legi la trian rimarkon, kiun prof-o Waringhien menciis speciale pri tiu temo (ĉar la demando ne estas nova!) fine de la artikolo "alia" sur paĝo 31-a de la antaŭ nelonge aperinta *Plena ilustrita vortaro* (PIV). La aŭtoro prave tie substrekas, ke Zamenhof avertis pri la kontraŭreguleco de tiaj formoj. Mi aldiras, ke Zamenhof, en siaj *Lingvaj respondoj*, nur tiajn formojn aprobis, kiel "kelk-iu", "kelk-iam", ĉar en tiaj formoj la du radikoj estas *nekripligitaj* kunmetitaj, sed li kondamnis ĉiajn formojn, en kiuj la radikoj estas arbitre kripligitaj. Efektive, en "al-iu" ks. la radikoj "ali-" arbitre reduktiĝas al stumpigita "al-", kvankam la radikoj "al" jam ekzistas kun tute alia signifo. La nuraj du esceptoj, kiujn Zamenhof enkondukis en nian lingvon, estis la sufiksoj *-ĉj-* kaj *-nj-*, kiuj ebligas kripligon de la antaŭa radikoj; ili plie estas la solaj sufiksoj, kiuj ne komenciĝas per vokalo.

S-ro Atanasov malatentis la fakton, ke la tabelo de la korelativaj vortoj *ne obeas* la ĝeneralajn regulojn pri la uzado de la nurvokalaj finaĵoj, kaj speciale de *-a*, *-e*, *-o* kaj *-u*. Iliaj respektivaj sencoj estas en la korelativa tabelo multe pli malvastaj; ĉe *-u*, la senco estas eĉ tute malsama. Waringhien atentigas en la jam menciita rimarko de la PIV, ke la fundamenta senco de "ali-e" ne estas la sama, kiel tiu de "al-ie" pro la ĵus aludita malplivastiĝo de la senco de la korelativa finaĵo *-(i)e*. Same al la demando "kiu domo?", logike oni devus respondi, uzante la "falsajn korelativajn": ne tiu domo, sed *aliu* (domo). Kaj sekve la senco de "al-ia", kiu respondus al la demando "kia?" diferencus de la fundamenta "ali-a". Tiaj konfuziĝoj naskus kompreneble ĥaoson. Por eviti ĝin, necesus do, ke la fundamenta radikoj "ali-" tute malaperu, por ke jam funkciu anstataŭ ĝi la nova serio da korelativaj vortoj.

André Gilles (Francujo)

NI LASU LA VIVON VENKI

Spontanea uzo
de denaska
esperantlingvaneto

Estas gratulinde, ke s-ro C. Dominique surtabligis publike (*Esperanto*, 11/1970, p. 170) la tiel longe latentan, sed ĉiam obstine denove sin anoncantan problemon, ĉu la formoj "alia, aliu..." estu konsiderataj kiel tabelvortoj kaj eĉ oficiale deklaritaj kiel tiaj. La argumentoj de s-ro Dominique estas plene validaj, kaj la sola timo de s-ro A.D. Atanasov estas, ĉu la esperantista publiko akceptos la ŝanĝon de la senco de "alie = alimaniere" je "alie = aliloke". Mi firme kredas, ke la publiko akceptos ĝin ĝoje, ĉar tio signifus definitivan forigon de ekstersistema, ja kontraŭsistema aperaĵo.

Mi volas kredi, ke la Akademio ne estas tiel konservativa, ke ĝi volus kontraŭi tion, kio mem trudiĝas en la vivon, kaj kontribui al la plua ekzisto de tiu ĉi malutila dualismo. Ja la uzo de la vortoj kun "ali-" laŭ la skemo de la tabelvortoj ĉiam plioftiĝas: uzas ĝin tiel multaj konataj esperantistoj — ekzemple eĉ Kalocsay —, la radio, la gazetaro.

Por subteni s-ran Dominique mi ŝatus prezenti ĉi tie argumenton, kiu espereble ne estas senvalora; ĉar ĝi estas liverita de la vivo mem.

Mi havas filon — denaskan esperantlingvanon. Kvankam mi plene favoras la entabeligon de la *ali-*vortoj, parolante kun li mi tamen ĉiam respektis la ĝisnunan, oficialan uzon (se eble evitante la uzon de la formoj "alie" en la senco de "alimaniere" kaj anstataŭigante ĝin per alia konvena). Sed kiam mia filo jam estis sufiĉe sperta lingve kaj konis eĉ la korelativajn, li mem, tute spontanee kaj sen mia influo, kreinte ilin laŭ la analogio de la tabelvortoj, ekuzis la formojn "aliu, aliu, alio, aliam, alie" (— aliloke) kaj aliel (— alimaniere)". Jen do pruaĵo pri la plena viveco kaj vivraĵo de la *ali-*vortoj en la tabelo.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakujo)

ĝuu la mondon

Distro estas esenca kondiĉo por bona sano. Se la laboro krakigas vian cerbon aŭ enuigas vian menson, memoru ke elektroniko kapablas redukti la labordaŭron, lasante pli da tempo por ripozamuzo.

Philips produktas radioricevilojn, televidon, diskojn kaj diskludilojn por la amuzo kaj plezuro de ĉiuj. Aktivan distriĝon kaj refreŝiĝon vi trovas uzante magnetofonojn de Philips aŭ, se vi ŝatas fotografion, utiligante ekfulmo-ampolojn, lampojn por projekcio aŭ por la senluma kamero. Junuloj lernas kaj distras sin konstruante aparatojn helpe de la Elektronikingeniera Skatolo de Philips.

La homo bezonas malstreĉon. Philips havigas ĝin.

Sed ĉiam minacas danĝero de malsaniĝo aŭ de akcidento.

X-radiaj kaj medicinaj aparatoj de Philips helpas teni vin en perfekta formo, ne nur por laboro, sed ankaŭ por distriĝo.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

en bona sano



PHILIPS

Eŭropo

- 20 jugoslavaj membroj de la Esperanto-Societo Niŝ, per 5 aŭtomobiloj, vizitis Rumanujon en majo 1971. Ilin akceptis rumantaj Esperanto-familioj. Forte impresis loĝantojn en la urboj, kiujn ili trapasis, la 5 aŭtomobiloj kun Esperantaj skriboj.

Hindujo

- La Alta Kortumo en Patna, Bihar, oficiale anoncis la decidon plivastigi la fakultativan uzon de la hinda lingvo en advokataj diskutoj kaj en ĵurdeklaroj submetataj antaŭ la kortumo. Tiu decido konformas al la federacia 1963-jara Oficiallingva Akto. Ĉiuj altaj kortumoj en Hindujo uzas principe nur la anglan lingvon.
- En la Universitato de Kolkata studentoj komen-cintaj en la lernojaro 1972-73 rajtos ekzameniĝi por bakalaŭriĝo kaj magistriĝo ankaŭ en la bengala lingvo krom la angla.
- La hinda jurministro s-ro H.R. Gokhale reagis en la 24a de julio al la propono konstitucie rekoni la raĝastanan, majthilan kaj bhoĝpuran lingvojn per la komentoj, ke la registaro atentus ĉiujn faktojn ĉe tiaj proponoj kaj ke oni traktos kiel gravajn la opiniojn esprimatajn de parlamentanoj.



La unuan de julio 1971 aperis la unua kajero de la eldono nederlandlingva de la kurso "Esperanto programita" de Hermann Behrmann. La germanlingva originalo de tiu novstila kurso, reklamita kiel "prov-eldono", por kiu oni bezonas la helpon de volontuloj-provler-nantoj, allogis preskaŭ 6 000 interesitojn. El tiuj novaj lernantoj, plura centoj troviĝis en Belgujo kaj Nederlando. La nova, plibonigita eldono en la nederlanda lingvo malfermas novan merkaton, kaj la administranto en Antverpeno, juna diplomito pri lingvoj s-ro Paul Peeraerts, jam en la unua monato ricevis pli ol 250 mendojn. La sistemo restas la sama, kiel por la germana eldono. Ĉiu, kiu anoncas sin, ricevas la unuan el la kvar kurskajeroj, diskon kun akompanaj tekstoj, informbroŝuron pri Esperanto kaj plenigendan testfolion. Li poste elektas, ĉu resendi la materialon, pludoni ĝin al alia lernemulo, aŭ konservi ĝin, pagante la kost-prezon. Sur la foto: Paul Peeraerts (adreso: Drakenhoflaan 97, B-2100 Deurne-Antwerpen, Belgujo) kun la aŭtoro Hermann Behrmann (dekstre).

LOKE — FAKE

Mozambiko

- En Lourenço Marques okazadas Esperanto-kursoj, kiujn partoprenas kelkaj dekoj da infanoj. Gvidas ilin s-roj M. Raposo, Agostinho de Almeida kaj Franco Simões.

Svedujo

- La fama aranĝo en Frostallen ("Sveda Somera Semajno") denove okazos en la venonta jaro, de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto. Prelegos interalie prof-o Ivo Lapenna. Informoj peteblaj ĉe: s-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö.

Usono

- En ŝtato Florida naskiĝis Esperanto-societo de Florida. La prezidanto, elektita de la reprezentantoj el 11 lokoj, estas s-ro Rex Bennett (5952 Mohr Loop, Tampa, Florida 33615).
- Doktorigis per disertacio pri Esperanto kaj ĝia literaturo prof-ino Margaret Hagler ĉe la Universitato de Indiana en 1971. Tiu 450-paĝa anglalingva traktajo kun titolo "The Esperanto language as a literary medium" baldaŭ estos akirebla por Esperantaj bibliotekoj. (Adreso de prof-ino Hagler: 625 S. New St., Apt. 3, Springfield, Ill. 62704.)

FAKE

Filatelo

- En la unua numero de la organo de la filatelista societo de Gwangju (Koreujo), aperinta en aprilo 1971 kun eldonkvanto de 2 000 ekzempleroj, troviĝas 5-paĝa artikolo pri la Internacia Lingvo kun fotoj de Esperanto-poŝtmarkoj. La prezidanto de la societo estas universitata studento s-ro Jeong Jong-Hju, kiu aktivas en la Esperanto-movado en Koreujo.

Filologio

- Rezulte de klopodado fare de la filio en Szczecin de Pola Esperanto-Asocio, kreiĝis sekcio de la Internacia Lingvo Esperanto en Pola Novfilologia Societo en Szczecin. La sekcio estas egalrajta al tiuj de aliaj lingvoj.

Komerco

- Nova ilustrita broŝuro "La konsumkooperada movado en Svedujo" estas havebla (senpage?) ĉe Kooperativa Förbundet, 396 Utlandsavdelningen, S-104 65 Stockholm, Svedujo.

Kristanismo

- Dum unu semajno antaŭ la 56a UK okazis la 24a Internacia Kongreso de KELI en Abingdon, Britujo. Partoprenis ĝin 130 personoj el 12 landoj, Krom la 60-jara jubileo de KELI kun programo plena de laboro, i.a. estis raporto pri la du okulklinikoj "D-ro Zamenhof" en Afriko, kiuj fondiĝis per monkolektado.

Pentrarto

- La Esperanto-societo en Sarajevo okazigis ekspozicion de pentraĵoj fare de s-ino Roza Pandžić-Herce-

— PERSONE

NOVAJ TURISMAJ PROSPEKTOJ EN ESPERANTO aperadas regule. Ĉar apenaŭ eblas menciĝi ĉiujn en la revuo, la membroj nuntempe povas trovi mencion pri ĉiu aktuale ricevebla prospekto ĉe la koncerna urbo en la Unua Parto de la Jarlibro (en la adresaro de la delegitoj), laŭeble kun preciza adreso de la eldonintoj.



gova, kiu estas membro de la societo. Pri la ekspozicio oni eldonis serbokroatan kaj esperantlingvan informilon.

Scienco

- Fondiĝis en aprilo 1971 Interaltlerneja Scienca Rondo de Esperantistoj, kies celo estas popularigado de Esperanto en la scienca medio kaj sciencaj kontaktoj pere de Esperanto inter altlernejoj en diversaj landoj. La Rondo nun serĉas kontaktojn kun ĉiuj altlernejaj Esperanto-grupoj. (La sidejo: Wrocław-17, poŝtkodo 16, Pollando.)

Teatro

- Pola Esperanto-Asocio lastatempe fondis profesiulan Esperanto-Teatron, al kiu apartenas en la nuna stadio tri geaktoroj kaj, kiel la literatura estro de la Teatro, s-ro Jerzy Grum, multjara laboranto en la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Ili nun preparas dramon "Por tiuj, kiuj estas supre", kiu temas pri kosmoŝipa vivo en nemalproksima estonteco.

Tradukado

- Laŭ lastatempa raporto de Unesko, dum la jaro 1969 pli ol 38 000 verkoj estis tradukitaj en 65 landoj: 3 853 verkoj en Sovetunio, 3538 verkoj en F.

R.G. kaj G.D.R. kune, 2 737 en Hispanujo, 2 483 en Italujo, 2 165 en Japanujo, 2 059 en Usono, 1 989 en Francujo, 1 669 en Svedujo, 1 606 en Nederlando, 1 449 en Ĉeĥoslovakujo, 1 249 en Danlando, 1 207 en Belgujo, 1 012 en Jugoslavio, 960 en Hungarujo, 825 en Pollando.

PERSONE

Kalocsay


- Prof. K. Kalocsay, la granda majstro de la Esperanta poezio, atingis sian 80-jaron la 6an de oktobro. La revuo *Hungara Vivo* dediĉis unu numeron speciale al sia eminenta samlandano, kaj UEA prezentis al li memorigan donacon en la nomo de la tuta membraro, dezirante lian ankoraŭ longan kaj aktivan vivon.

Lapenna

- La prezidanto de UEA, prof-o Ivo Lapenna, vizitante por fakaj celoj Hungarujon post la 56a UK, faris laboron utilan por Esperanto. Estis pluraj gazeto-kaj radio-intervjuoj; oni raportis televide pri lia vizito al unu el la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Li ankaŭ prelegis en lokaj grupoj.



La daŭra kresko de la internacia transporto signifas, ke plioftiĝas la kontaktoj inter la Esperantomovadoj de la diversaj landoj de Sud-Ameriko, kiujn en multaj kazoj dividas miloj da kilometroj. La seminariojn de KKE en Brazilo, ekzemple, regule vizitas membroj el ĉiuj partoj de tiu landego, kvar mil kilometrojn longa. Sur la foto: Urugvaja Esperanto-Societo organizis koktelfeston, la 8an de aŭgusto, okaze de la fermo de la 56a Universala Kongreso. Tiukaze formiĝis planoj pri komuna renkontiĝo de esperantistoj en Argentino, Urugvajo kaj Brazilo, kiuj, malgraŭ la distancoj, estas "najbaroj".



LABORPLENA 27-A I.J.K.

La junularaj kongresoj havas nuntempe tute propran karakteron. Se oni povus karakterizi la Universalajn Kongresojn per la vorto 'bazaro' (ĉio por ĉiuj, sed malfacile trovebla en la aro), tiam la IJK-oj, almenaŭ la ĉijara similis al malgranda butikoj kun limigita kvanto da varoj, sed tiuj elektitaj kun gusto.

Organize la edinburga IJK apenaŭ havas konkuranton inter la antaŭaj IJK-oj. Modernigitaj studentaj loĝejoj funkcias kiel loĝejo, manĝejo kaj kongresejo. La organizado estis en ĉiuj detaloj perfekta. Oni povis aprezi tion des pli post la iom improviziita IJK en Graz pasintjare.

LA TEMO

Ĉiu IJK havas nuntempe temon, eĉ sufiĉe ambician. Laŭ la modelo de la IJK en Tyresö la ĉijara nomis la temon 'Junularo kaj kulturo'. La temon oni pritraktis per kvar bazaj prelegoj, kvar aŭ kvin aldonaj prelegetoj kaj per posta diskutado en grupoj. Tiamaniere oni povis sufiĉe detale prilumi la problemaron.

La bazajn prelegojn liveris W. Auld, J.C. Wells, H. Eichhorn kaj H.M. Maitzen. Necesis difini la koncepton kulturo, apartajn kulturojn; pridiskuti, ĉu ekzistas speciala junulara kulturo, ĉu monda kulturo. Multon oni aŭdis pri influoj de unu kulturo al aliaj, pri kultura imperiismo. Ofte la diskutoj temis pri kulturo ĝenerale, malpli ofte pri la rolo de la junularo en la kulturo, eble pro la fakto, ke la rolo de la junularo ne multe diferencas de la rolo de iu ajn alia homgrupo.

GAZETARO

La LKK preparis gazetaran konferencon, kaj ĝi havis la deziritan efikon. La edinburgaj gazetoj priatentis la kongreson kaj raportis pri ĝi. En la lundo la serioza gazeto 'The Scotsman' eĉ informis sur siaj afiŝtabuloj, ke 'junaj esperantistoj renkontiĝas en Edinburgo'.

Intereson montris eĉ la skota eldono de 'Times Educational Supplement', kiu dediĉis sian ĉefartikolon al Esperanto. Ĝi diris:

'(...) Pasintsemajne en Londono 2000 esperantistoj partoprenis mondan kongreson kaj ĉisemajne en Edinburgo la junulara versio altiris 150. Tio estas iamaniere imponaj ciferoj, kaj almenaŭ esperantistoj trovas ilin esperplenaj. Sed se Esperanto vere estus la dua lingvo de la tuta mondo, ne ekzistus halo en iu ajn urbo, kiu taŭgus por konferenco de esperantistoj — kaj apenaŭ ekzistus kaŭzo por esperantistoj speciale renkontiĝi. (...)

Se ĉiuj mezlernejoj en Skotlando devas lerni duan lingvon, kial ĝi ne estu Esperanto? Ĝi estas ĉiukaze pli facile lernebla, ol la franca kaj la germana.

Tio malgrandigus la timon de tiuj, kiuj malŝatas la superecon de la franca en la lingvaj lernejklasoj. La lernado de Esperanto instruus al la infanoj la elementojn pri lingvo (unu el la celoj de la instruado de vi-

vanta lingvo, kiun ĝiaj malregulaĵoj tiel ofte malhelpas); kaj dum oni povas argumenti, ke artefarita, tute regula lingvo ne estas ilo por instruado pri vivantaj, neregulaj lingvoj, Esperanto certe meritas provon en la elementaj ŝtupoj de mezlerneja procezo, kiu estas ĉiukaze artefarita. Tio povus eĉ krei entuziasmon pri vivantaj fremdaj lingvoj. (...)

LA KOMITATO

En Londono la komitato de UEA akceptis projekton pri novaj rilatoj inter UEA kaj TEJO, kune kun la konkludoj de la komisiono pri junularo pri tiu projekto. Kaj en Edinburgo estis la vico de TEJO pridiskuti ĝin.

La celoj de la projekto estas, mallonge dirite, financa integriĝo kaj profesiigo de la administrado de TEJO. Pli klare dirite, tio signifas, ke la kaso de TEJO malaperos en la kason de UEA, kaj ke pluraj rutinaj laboroj, kiujn nun faras la estraro de TEJO, estos farataj en la Centra Oficejo de UEA.

La komitato de TEJO kompreneble ĉefe diskutis pri la samo kiel la komitato de UEA, tio estas pri la problemoj, kiun la junulara komisiono de UEA esprimis: 'TEJO timas, ke la administra kaj financa integriĝo laŭ la Projekto pri novaj rilatoj povus perdis la ĝi necesan aŭtonomecon'.

Post kelkaj amendoj, kiuj tuŝas detalojn, sed ne la esencon de la projekto, la komitato akceptis la projekton. Se UEA ankaŭ akceptos la amendojn, ĝi ekvalidos. Oni povis rimarki en la komitato de TEJO, ke la diskutado ne estis sufiĉe longa kaj ne sufiĉe preparita, ĉar granda parto sindetenis en la voĉdonado.

Alia grava temo leviĝis je la fino de la komitataj kunidoj, kiam la balo de la lasta vespero jam komenciĝis en alia loko. Temis pri partopreno en la ĵus starigita Eŭropa Kunordiga Buroo (EKB) kaj la starigota Eŭropa Junulara Fonduso (EJF).

Montriĝis, ke duona frazo en la antaŭparolo al la statuto de EKB estas neakceptebla por la landaj sekcioj en orienta Eŭropo. Jeanne-Marie Liouville kaj Wim Jansen en la NEJO-komisiono faris la preparlaboron kaj la kontaktadon kun la organizaĵoj de EKB, kaj ili opinias, ke la orienteŭropa sinteno dependas de miskompreno pro malbona formulo.

La hezitemo estas pli forta rilate al EJF. Kaj la decido de la komitato nature devis esti, ke ni tenu la kontakton kun tiuj ĉi organizaĵoj kaj pridiskutu ilin dum la jaro. Eble en la venonta kongreso eblos fari decidon.

Novan estraron oni kompreneble elektis. Humphrey Tonkin ekis kiel prezidanto, kaj Renato Corsetti transprenis tiun laboron. Flóra Szabó-Felső fariĝis ĝenerala sekretario. 4 novaj homoj eniris la estraron. Wim Jansen el Nederlando, kun longa sperto de la NEJO-komisiono, transprenas la regionan agadon. Guy Matte el Kanado, kiu estas ankaŭ komitatano



de UEA, prizorgos la kontaktojn kun UEA kaj ankaŭ la redaktadon de *NNV*. Claude Nourmont, kiu prizorgis la seminarion pri lingvo kaj kulturo en Strasburgo, estros i.a. studojn. La kvara novulo estas Živorad Jevtić, kiu ne ĉeestis la kongreson.

Kiel kongrestemon por la venonta jaro oni elektis la proponon 'Junularo kaj la tria mondo'. La 28a IJK okazos en Toruń, Pollando, kaj en Portland estos junulara konferenco.

La ĝenerala sekretario (s-ro Babakar) de la Monda Federacio de Demokratia Junularo (MFDJ) ĉeestis

la kongreson. Post la oficiala fino de la kongreso, la prezidanto de TEJO kaj s-ro Babakar povis subskribi interkonsenton pri kunlaboro rilate partoprenon en seminarioj, interŝanĝo de inform-materialo k.s.


LABORKONGRESO

La kongreso estis ĉefe laborkongreso, eĉ se oni trovis iom da tempo por amuziĝo. Por doni unu ekzemplon pri laboremo mi menciuj, ke la komitato unu tagon kunsidis de la 14a ĝis la 22a horo, kun nur unu paŭzo por la vespermanĝo. Krom tio tiun vesperon estis la oficiala balo.

Ne estas do strange, ke la ĉirkaŭa mondo apenaŭ ekzistis dum tiu semajno. Bildon pri la ekstera realaĵo alportis speciala alvoko de sud-sudanaĵ studentoj, kiuj atentigis pri la milito en sia lando. Dum la ferma kunsido Humphrey Tonkin, nun honora prezidanto de TEJO, menciis tiun eksteran realaĵon:

'Facile oni forgesas, kaj ankaŭ en la nuna kongreso oni eble forgesis, ke ekzistas mondaj problemoj, kiujn ni ne rajtas ignori. Hieraŭ ni aŭdis pri la situacio en suda Sudano. Samtempe dum la nuna semajno mortis ankoraŭ homoj en Hindocinio; mortis, pro malsato kaj malsano, homoj en Bengalujo kaj la proksima regiono; mortis en pluraj mondopartoj homoj pro manko de interkompreno, pro manko de la bazaj scioj pri la homaj rilatoj. Mortis efektive ankaŭ — kaj tion eble kelkaj ne scias — pli ol 20 homoj en la pasinta semajno interne de 200 mejloj de tiu ĉi loko, nome en Nordirlando. Tiaj aferoj daŭros, bedaŭrinde ili verŝajne ĉiam daŭros, sed TEJO sub neniu cirkonstanco povas ilin ignori. Tio ne signifas neceson, ke TEJO devas ĉiam preni iun pozicion rilate tiujn aferojn, sed ĝi nepre devas esti konscia, ke ĝi laboras en unu kampo, flank' al flanko al aliaj homoj, kiuj laboras por homaj rajtoj kaj por pli bona mondo'. (Teksto kaj bildoj de Ulla kaj Franko Luin.)

 ne rajtas sidi en tiu ĉi sama trinkejo pli ol dek minutojn" — David Kelso (foto), la prezidanto de LKK, instruktas. Sube: unu el la ĵurnal-reklamaj afiŝoj sur la ĉefstrato anoncas la TEJO-kongreson.



JUNULARA TAGO KADRE DE LA 56-A U.K.

"Kiel kutime ankaŭ ĉijare unu tago de la semajno de la Universala Kongreso estis dediĉita precipe al TEJO kaj al la junularo," — Tiel komenciĝas la raporto de s-ro G.D. Winkler (F.R. Germanujo) pri la Junulara Tago.

 Krom la Oratora Konkurso, jam raportita en la septembra numero, la kulmino de la intereso estis ĉe diskutoj pri lingvo kaj kulturo kaj pri rilatoj inter TEJO kaj UEA, kun ĉeesto de proks-e 250 personoj. Por la diskutado pri rilatoj inter TEJO kaj UEA oni elektis la formon de podia diskuto inter kelkaj aktivoj. Al tio sekvis vigla diskuto de la ĉeestantaro, en kiu troviĝis ankaŭ eksjunaj personoj; sinsekvis vortbatalo, pacigado.

"Bonega ideo" ne simple "lunĉi", sed "pikniki" en londona parko — pro pluvego — ne efektiviĝis; la de kelkaj personoj antaŭtimata "grandapiknika kontraŭestabluma manifestacio TEJO-a" do ne okazis.

"La posttagmezo estis specialaĵo por niaj sociologiemuloj kaj politikemuloj," raportas s-ro Winkler, "programeris ses diversaj studvizitoj (...) al konservativa, laborista kaj komunista partioj, al Amnestio Internacia, al la nacia sindikato de fervojistoj."

En la tradicia "Junulara Balo" iel mirigis kelkajn junajn amikojn, kiuj ĉeestis unuafoje la Universalan Kongreson, la fakto, ke estis tiel multaj "balantaj" nejunuloj. La plurtabula TEJO-ekspozicio donis al ĉiuj preterirantoj koncizan superrigardon pri la TEJO-laboro.

"Estas vero, ke la junularo kelkpunkte sufiĉe kritikis la plenkreskulan movadon kaj ke ankaŭ ĉi tiu je sia flanko ne ĉiam samopinias kaj kontentas pri la vojoj elektitaj de la junularo; sed ĉu ĉi tio vere tiel gravas? — Laŭ mia opinio, gravas, ke tio estas pruvo, ke la junularo interesiĝas kaj okupiĝas pri la problemoj de la movado kaj serĉas novajn vojojn por solvi kelkajn." — Tiel konkludas la raportinto.

Donu al ŝlosiloj novan titolon

Skribas E. Sonnenfeld (Urugvajo):

La vorto "Ŝlosilo" havis miaopinie malbonan efikon. Ĝi naskiĝis en la epoko, kiam oni pensis, ke sufiĉos uzi Esperanton sendante leterojn al neesperantistoj kun almetita ŝlosilo por "deĉifrado". La sekvo de la vorto "Ŝlosilo" estis, ke oni eĉ hodiaŭ kalumnias Esperanton, deklarante ĝin taŭga nur por primitivaj komunikaĵoj. Tamen, "Ŝlosilo" havas sian utilon kiel unua varbilo, kondiĉe ke ni ne proponas ĝin kiel deĉifrilon, sed nur kiel unuan informilon. Tial mi pledas: Eldonante ilin, ni ŝanĝu la titolon. Mi eldonus ilin popare kun la titoloj: 1) Unua kontakto kun Esperanto (enhavo: eta gramatiko kaj konciza vortaro), 2) Unua kontakto per Esperanto (enhavo: letermodeloj por korespondado). Mi sugestas, ke oni proponu al mondfamaj firmoj kiel *Philips*, *Coca Cola*, *Lufthansa* ktp. aŭspicii la eldonon, ĉiu en 2-3 aŭ pli da lingvoj kun konvena anonco de la koncerna firmo: ĝi pagu la kostojn kaj ni disdonu reklamcele ilin al la publiko.

Lerniloj de naciaj lingvoj

Skribas Osmo Buller (Finnlando):

Informante ne-esperantistojn pri Esperanto, ni ofte fanfaronas, ke post ĝia lernado la lernado de fremdaj naciaj lingvoj rimarkinde plifaciliĝos, precipe, kiam temas pri la hindoeŭropaj lingvoj. Tamen, ĝis nun ni

Lingva baro en IHEU

'La partoprenantoj de la 5a Mondkongreso de IHEU (Internacia Humanista kaj Etika Unuiĝo, okazinta en Cambridge-Boston, Mass., Usono — noto de la red.) venis el 14 landoj. El la 360 aliĝintoj, 255 estis el Usono mem. Kiel en pli fruaj renkontiĝoj, la angla estis kompreneble la ĉeflingvo. ... Tiel estis konstateblaj konsiderindaj lingvaj malfacilaĵoj, kaj pluraj delegitoj, ekzemple el Jugoslavio aŭ Rumanujo, ne povis ĉion sekvi, kio tie okazis. Estonte ni insistos ĉe IHUE, ke internaciaj renkontiĝoj okazu en pluraj lingvoj. ... Pro ĉi tiuj malfacilaĵoj tute restis for ekzemple la amikoj el Francujo, kaj el Italujo ĉiuj krom unu. Internacia unuiĝo tamen devas unuavice prizorgi, ke homoj el plej diversaj nacioj kaj rasoj interproksimiĝu kaj ligu personajn amikecojn. Necesas unue forigi la lingvajn barojn, kiuj en tiaj okazoj leviĝas...'

— el: "Der Freireligiöse" (nov-dec. 1970)
Ludwigshafen, FRG.

fakte nenion faris por helpi al tiuj esperantistoj, kiuj pere de la Internacia Lingvo volas lerni iun nacian lingvon. Se vi rigardas la libroliston de la Jarlibro de UEA kaj klopodas serĉi lernilojn de naciaj lingvoj, vi certe malsukcesas. (Nur unu-du frazaroj, sed neniu vera lernolibro). Ĉu ni eble timas la eldonon de tiaj lerniloj? Espereble ne, ĉar malsaĝe estas kredi, ke, lerninte iun nacian lingvon, esperantisto povus iĝi eksa esperantisto. Do, mi alvokas al niaj lingvistoj kaj eldonistoj: Aperigu lernilojn de naciaj lingvoj, kaj grandaj kaj malgrandaj.

Respondas la redakcio:

La argumento, ke scio de Esperanto faciligas postan lernadon de aliaj lingvoj, ne signifas, ke devas ekzisti en Esperanto lernolibroj pri tiuj lingvoj. Laŭdire, la regula strukturo de la Internacia Lingvo helpas al la lernanto kompreni la strukturon de aliaj lingvoj, egale, per kiu lingvo li studas ilin. Ĉu efektive? La kelkaj jam faritaj eksperimentoj en lernejoj bedaŭrinde ne pruvas (nek malpruvas) la aserton.

Kontraŭ nedecaj eldonaĵoj

Skribas Tadeusz Nowakowski (Pollando):

En la juli-aŭgusta numero de *Esperanto* estas almetita la faldfolio de la dana eldonejo TK, anoncanta i.a. du, evidente pornografiajn, eldonaĵojn.

Sendube: multaj homoj avide kaj plezure legos tion — ŝajnas tamen, ke ĉiaokaze UEA, kiel tiom grava kaj respektata institucio, ne devus preni sub sian egidon tiuspecajn poziciojn.

Respondas la redakcio:

La almeto de la faldfolio estis pagita reklamo. Pri ĝia enhavo respondecas sole nur la eldonejo TK. (Vidu la atentigon sur p. 140 de la juli-aŭgusta numero). Ni akceptis la reklamon, unue ĉar ĝi koncernas ankaŭ tre valorajn verkojn kiel la Nobla Korano, due ĉar ni juĝis, ke verŝajne la faldfolio mem nenion ofendos.

Ŭ kaj Ƶ

Skribas Yasunori B. Takata (Japanujo):

Ĉu ni ne volas, ke Esperanto estu la internacia lingvo? Ĉu ni ne volas, ke UEA gvidu la movadon? Kial do vi arbitre ŝanĝis la literon ŭ al Ƶ? Mi ne plu povas toleri la malbelan literon Ƶ.

Respondas la redakcio:

La uzo de u kun pinta hoko estas ligita al la transiro al la alia kompost-sistemo, okazinta en oktobro 1970. Uzi la aŭtentikan literon signifus investon de pliaj 2000-3000 guldenoj. Ni opinias, ke la malgranda diferenco ne pravigas tian elspezon.

SUR ALIA PLANEDO

Nia spaco-ŝipo atingis nekonatan planedon. Mi *elŝi-piĝis* kaj komencis esplori ĝin. Kaj subite mi troviĝis antaŭ unu el la homoj, kiuj loĝas sur tiu nekonata planedo. La *ulo* estis egala al ni, sed tute senhara. Lia kranio aspektis kiel polurita ovo de struto. Mi faris *amikecan* geston al la senharulo kaj diris:

'Mi venas de la Tero, de mondo, kiu troviĝas je tiu direkto. Mi estas amiko'.

'Ĉu? ', demandis la *aliplanedano*.

'Jes! Amiko! Ni, teranoj, estas egalaj al vi, kiel vi mem povas konstati, observante min.'

'Ĉu? ', li rediris.

'Egalaj al vi. Sed ni havas sur la kapo tion, kion ni nomas 'haroj'; ĉu vi vidas? ' Kaj mi *mantuŝis* mian densan hararon.

'Haroj, ĉu ne? ', diris la ulo.

'Jes, haroj. Ili kreskas sur la kranio. Ni ne estas kiel vi, tute senharaj.'

Kaj tiam, subite, la kalvulo sin ĵetis sur min. Per piedoj kaj pugnoj li terure batis min. Post tio li foriris, frustrante: 'Kia malrespekto! Ĉu ne sufiĉas, ke oni mokas pri mi sur ĉi tiu planedo, ĉar mi estas senhara. Nun alvenas eksterplanedano por ridindigi min! ' (Verkis: Ergoto de Bonaero)

Klarigoj:

el-ŝip-iĝ-is: iĝi el la ŝipo; forlasi la ŝipon (Komparu: enŝipiĝi = iri en la ŝipon).

ul-o: la sufikso 'ul', uzata memstare, indikas individuon, sen difini specialajn ecojn. ('Ulo', uzate sola, ne havas tre flatan signifon.)

amik-ec-a: tie ĉi temas pri 'gesto de amikeco' kaj ne 'gesto de amiko', ĉar la du viroj ankoraŭ ne estis amikoj.

ali-planed-an-o: ano (loĝanto) de alia planedo (Komparu: teranoj = anoj (loĝantoj) de la Tero, alinacianoj = anoj de alia(j) nacio(j), samurbanoj = anoj de la sama urbo).

man-tu-ŝis: tuŝi per la mano (Komparu: kapjesi = diri 'jes' per movo de la kapo; kapnei = diri 'ne' per la kapo; piediri = iri per la piedoj).

LA PROVINCO DRENTO

El ĉiuj nederlandaj provincoj, Drento estas verŝajne la malplej bone konata. Ĝi estas, tamen, riĉe dotita de la naturo kun belegaj erikejoj kaj densaj arbaroj. Birdoj de ĉiaj specoj tie kovadas en neĝenata trankvileco. Silente promenante tra arboriĉaj regionoj, oni ne malofte ekvidas areton da kapreoloj, kiuj gaje saltetas aŭ kviete paŝtiĝas. Tiuj, kiuj dum la somera libertempo volas ĝui la vigle pulsantan vivon de la granda urbo aŭ la monduman plezuron de la plaĝo, nepre ne vizitu tiun ĉi provincon, ĉar grandparte ĝi estas ankoraŭ oazo de ripozo kaj de spirita malstreĉiĝo.

Sed, se vi amas la netuŝitan naturon, se vi deziras malkovri parton de Nederlando, kiun eĉ multaj nederlandanoj ankoraŭ ne konas, vi ne prokrastu vian viziton. Ĉar iom post iom la industrio penetras ankaŭ en la provincon Drento, kie ankoraŭ *troveblas* kaj dungeblaj laboristoj kaj tereno.

Sur komforta brakseĝo mi sidis antaŭ mia *karavano*



kaj legis distraĵan romanon. Mi sentis min feliĉa, ĉar mi trovis unu el la plej belaj kampadejoj, kiu situis en la tuja apudeco de la drenta vilaĝeto Hollandsche Veld. La kampadejo estis tute diferenca de ĉiuj aliaj, kiujn mi konas. Por ĉiu karavano aŭ bangalo-tendo ekzistas speciale aranĝita rezervejo, ia speco de 'Haveno por parki', kaŝita en la pin-arbaro. Tiel oni ĝuas absolutan privatecon. Eĉ siajn najbarojn oni ne povas vidi, nek aŭdi, pro la ĉirkaŭantaj arboj kaj arbustoj. Malgraŭ tiu relativa izoliteco, ĉiu parkejo estas konektita al la elektra reto. Meze de la vasta tereno troviĝas moderna naĝejo, kiun ĉirkaŭas zorgeme flegita herbejo.

Tre ĉarma estas ankaŭ la loĝejo de la familio, kiu estras la kampadejon. Ĝi troviĝas tute izolita de la karavanejo, kaj la domo estas konstruita laŭ la tipo de bangalo, kun tre grandaj fenestroj. En la artefarita lageto antaŭ la domo ŝprucis fontano kaj faligis siajn akverojn sur dorsojn de du neĝe blankaj cignoj. Ili apenaŭ moviĝis sub la akvofalo. Ĉe la bordo paŝetis kelkaj pavoj. Unu el ili elmontris sian bril-koloran voston kiel majestatan ventumilon. *Flugilklakante* subite leviĝis el la arbaro grupo da fazanoj kaj perdrikoj, kiuj *grandkvante* nestiĝas en tiu ĉi netuŝita naturo, for de la trafika bruego de la grandaj urboj. Kiam mi alvenis en tiu ĉi kampadejo, mia teko estis *plenŝtopita* per dokumentoj kaj aliaj aferaj paperoj. Mi devas honeste konfesi, ke mi ne malfermis ĝin.

Klarigoj:


trov-ebl-as: estas trovebla — eblas trovi. Anstataŭ diri 'tio ne estas ebla, aŭdebla, videbla, farebla ktp.' oni povas same ĝuste skribi kaj diri 'tio ne eblas, aŭdeblas, videblas, fareblas ktp.'

karavano: loĝ-veturilo, plejofte tirata de aŭtomobilo (ruldomo) ('Karavano' havas ankaŭ aliajn signifojn: konsultu vian vortaron)'.

flug-il-klak-ant-e: klaki per la flugiloj. La birdoj leviĝis, klakante per la flugiloj = la birdoj leviĝis flugilklakante.

grand-kvant-e: en granda(j) kvanto(j). Komparu ankaŭ: grandamase, grandparte, grandanime (noble), grandskale, ktp.

plen-ŝtop-it-a: tute plenigita — plene ŝtopita. Atentu ankaŭ la uzitan prepozicion post 'plenŝtopita'. Mia teko (dokumentujo) estis plene ŝtopita (de mi) per dokumentoj kaj aliaj paperoj.



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F 75 Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1970, Unua Parto, p. 488. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs).

Dimanĉe

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.00-12.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I. K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I. K.

09.45-10.00 Bratislava, 68.72 Mcs (mod. frekv.). K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1 Ĉeĥoslovakio.

12.15-12.25 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, Ch-3000 Bern 16, Svislando.

Merkrede

12.15-12.25 Bern, kiel lunde. (s-ro Gacond.)

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvan merkredon.)

Ĵaŭde

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs). P. (d-ro Baur.)

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

09.45-10.00 Bratislava, kiel lunde.

16.15-16.30 Bratislava, kiel lunde.

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F 63 Clermont-Ferrand, Francujo

20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.

21.40-22.00 Tallinn, 290 m (1034 kcs), 49.30 m (6085 kcs). I. Eesti Raadio, Esperanto, Poŝtkesto 402, Tallinn, Sovetunio. (Nur la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.)

23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

07.30-07.45 Bratislava, kiel lunde.

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 19 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Córdoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond.)

NEKROLOGOJ

RENI LECAT

S-ino Reni Lecat, pol-devena belgino kaj membro de UEA ekde 1945, mortis en la 15a de aŭgusto 1971. Ŝi, loĝante en Belgujo, multe helpis eksterlandajn esperantistojn krom la financaj subtenoj al pluraj por-movadaj aferoj.

LOUIS ARMAND

Fama sciencisto/verkisto Louis Armand, membro de la Franca Akademio kaj simpatianto al Esperanto, mortis en la 30a de aŭgusto 1971 je la aĝo de 66 jaroj.

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj: — dana dimanĉe inter 20.00 kaj 20.30 per ondoj 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs); — germana ĉiutage (escepte mardon, dimanĉon kaj festotagojn) inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs); — sveda marde inter 16.00 kaj 16.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs).

La anguletoj en la germanaj elsendoj estas 5-minutaj; la anguletoj en la svedaj kaj danaj elsendoj estas 3-minutaj. Ili estas aŭdigataj ĉe la fino de la koncerna duonhora elsendo.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 449, 1 septembro 1971

GRAVAJ DONACIOJ AL LA BIBLIOTEKO 'HECTOR HODLER'

Ankoraŭ en 1970, s-ro Ota Ginz (Israelo) decidis fordonaci, plejparte al UEA, sian riĉan Esperanto-bibliotekon, kiun li komencis kolekti kiel infano kaj serioze kompletigadis dum la tuta vivo. Estas konsiderinda jarvico, ĉar li en julio nunjara atingis sian 75an jaron. Per tiu grandanima ago li deziras, kiel li mem skribas, 'subteni bibliotekon de tutmonda signifo per valora kontribuaĵo kaj tiel parte korekti la mankojn, kaŭzitajn per nekompleta transdono de la Hodler-biblioteko.'

Inter pluraj centoj da valoraĵoj donacitaj de s-ro Ginz estas aparte menciindaj: la Unua Libro de Esperanto (pola eldono, 1887), la Dua Libro (1888), ses jarkolektoj de la unua Esperanta gazeto *La Esperantisto*, la unua lernolibro por ĉeĥoj, fruaj tradukoj kiel *Princino Mary* de Lermontov (1889) kaj *Boris Godunov* kaj *Neĝa blovado* de Puŝkin (1893-4), jarkolektoj de *Literatura Mondo* kaj bonstata ekzemplero de unu-spesmila monero.

En la nomo de la tuta membraro kaj precipe de tiuj seriozaj studantoj de la Esperanto-literaturo, kiuj helpe de fotokopioj aŭ per rektaj vizitoj disponas nun pli kompletajn studmaterialojn, ni profunde dankas al s-ro Ginz pro tiu vere grandioza riĉigo de la Biblioteko 'Hector Hodler' en la Domo de UEA.

PLIA ĈAMBRO NOMITA EN LA DOMO DE UEA:

La 8-an de junio 1971 mortis en Blackburn, Britujo, s-ro Frank Netrval, membro de UEA seninterrompe dum 23 jaroj. Inter la lastaj deziroj, kiujn s-ro Netrval komunikis al sia edzino, estis donaco de £500 (4 221,88 gld.) al UEA. Interkonsente kun la vidvino de s-ro Netrval, UEA donos la nomon "Ĉambro Frank Netrval" al la fotografia ĉambro en la domo de UEA en Rotterdam, la sola regule uzata ĉambro, kiu ankoraŭ ne ricevis nomon.

S-ro Netrval povis donaci tiun sumon al UEA pro la profitoj, kiujn donis al li la vendado de speciale fabrikita dolĉaĵo, sub la nomo "Esperanto-Roko", dum la Universala Kongreso en Harrogate (1961).

NOVAJ KOTIZOJ EN DOLAROJ

Sekve de la malplivaloriĝo de la usona kaj kanada dolaroj kontraŭ la guldeno kaj la ankoraŭ necerta perspektivo de tiu kurzo, UEA decidis plialtigi la membro- kaj abonkotizojn en usonaj kaj kanadaj dolaroj por 1972 jene: MJ = 4,65; MA kaj MA-K = 9,30; MS = 13,80; J-MJ = 2,30; J-MA kaj SA = 6,90; abono de "Kontakto" = 2,50; abono de LMLP = 8,—. La legantoj en Usono kaj Kanado bonvolu noti tiun novan tarifon, kiu anstataŭas tiun aperintan en la Jarlibro por 1971.

NOVA PERANTO EN PORTUGALUJO

Post 20-jara servo al la Asocio kiel peranto por Portugalujo demetis tiun oficon s-ro José Antunes. Transprenas ĝin kiel nova peranto: s-ro Antonio da Silva Almeida, Rua Macau, 3, 2º, esqº, Amadora. Ni kaptas la okazon por publike danki al s-ro Antunes por la fidela servado tra du jardekoj kaj deziri al li merititan ripozon post la emeritiĝo.

La makedona lingvo = Bulgara dialekto ?

"La soveta aŭtoro ligo rifuzis subskribi interkonsenton por literatura kunlaborado kun Jugoslavio, ĉar la teksto estis formulita en la makedona lingvo. Moskvo sekvas tiurilate la ekzemplon de Bulgarujo, kiu rifuzas fari interkonsentojn kun Jugoslavio, kiam ili estas skribitaj en la makedona.

La kontestado inter Bulgarujo kaj Jugoslavio daŭras jam plurajn jarojn. La bulgaroj postulas la tutan teritorion kaj nomas la makedonan *bulgara dialekto*."

NRC—*Handelsblad*, 13.4.1971

•••••

39-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

La prepara Komitato de la 39-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj dankas plej sincere ĉiun, kiu kontribuis al la blindula kaso de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto.

Eunice Hughes, Sekretariino

KAJ NUN ... AL PORTLAND!

Multaj jam aliĝis al la internacia flugkaravano de UEA al la 57a UK. Partoprenu ankaŭ vi kaj rapide! Petu aliĝilon kaj ĉiujn detalojn de la ĉisuba adreso. Neniam venos pli taŭga ŝanco por vidi la pacifikan bordon de Usono!

Prezo: 980,— gld. Antaŭpaga sumo: 100,— gld. Ĝin oni NE perdos, se ial ajn oni devos poste rezigni. Datoj: forflugo el Amsterdam: 26.7.1972; reveno: 19.8.1972. Se multaj tion deziras, eble oni povos kelkajn tagojn plifruigi la revendaton. Pri ĉio skribu al: f-ino M. H. Vermaas, komisiito de UEA por specialaj taskoj, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002. Pĉk. 333790. Telefono: 010-364542.

"S-ino Johana Cluniat, 9 Rue Pardoux-Bordas, F-87-Saint-Yriex-la-Perche, Francujo (39-jara, 1,56m. alta, 50 kg. peza, konfekci-laboristino), deziras korespondi kun 30-45-jaraj sinjorinoj aŭ fraŭlinoj el Belgujo, Jugoslavio, Nederlando, Svisujo kaj aliaj landoj. Certe respondos."

15-a Esperantista Skiferio, Adelboden, Svislando. De la 26-a de decembro '71 ĝis la 5-a de januaro '72. Petu la detalan informilon: Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314 La Sagne (Svislando).

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

ANON- CETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondencas sole nur la anoncantoj.



S-ro N. Droz ▼

Mi petas ĉiun el ĉiuj religioj el la mondo, escepte kristanojn kaj atestantojn de Jehovo, bonvole sciigi al mi, Esperante, ĉu li ion scias, iam aŭdis, aŭ legis pri la profetita lastvenonta mondmilito de "Har-Magedon". Kiu respondas, helpas al mi verki por la mondpaco, kaj ricevos kiel dankon ilustritan poŝtkarton el Svislando. N. Droz, Sackzelg 41, Pf.212, CH-8047 Zŭrich, Svislando.

"Mezaĝa ĉeĥino serĉas seriozan samideanon por interkorespondado (celo: geedziĝo). Korespondo eblas germane, Esperante. F. Holcová, Martinská 483, Kostelec n.L., Ĉeĥoslovakujo."

Ĉu interesas vin gazeto pri miniaturaj aŭtomobiloj por kolektantoj, konstruistoj aŭ konkursantoj, kiu aperas ĉiumonate en la lingvo angla, kaj kostas nur 8,40 dol. jare? Bonvolu skribi kaj peti senpagan ekzempleron de *Car model magazine*, 1301 East McDowell Road, Phoenix, Arizona 85006, Usono. Ni havas intereson pri miniatur-aŭtomobilaj produktoj el la tuta mondo kaj ni parolas Esperanton.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

Havi amikojn el la tuta mondo volas juna instruistino f-ino Anna Gabian, Lysa Góra T. C., pow. Brzesko, woj. Krakowskie, Pollando.



De tempo al tempo alvokas min heredantoj de esperantistoj, kiuj postlasis esperantolibrojn. Volonte mi dividas ilin inter tiuj, kiuj pro cirkonstancoj (ekzemple, ĉar ili loĝas en nepagipovaj landoj) ne povas aĉeti Esperanto-verkojn. Estas dezirinde, ke mi sciu la preferon al prozo aŭ poezio. Interesiĝantoj turnu sin al: Hans Bakker, v. Tuyll v.Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z, Nederlando.

Instruistoj! Sukcesigu gravan per-Esperantan eksperimenton! 20 francaj instruistoj deziras enkonduki korespondadon inter sia kaj alilandaj klasoj. Detale informas: Lentaigne, 3 av. Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo.

Koloran faldfolion en Esperanto, pri la urbo Örebro en Svedujo, vi ricevos senpage. Petu ĝin ĉe Turistbyrån, Storgatan 1, S-703 61 Örebro, Svedujo.

Por tre grava urba ekspozicio, geinfanoj el la tuta mondo sendu viajn desegnaĵojn ĝis novembro al: Esperanto-Ekspozicio, Ayuntamiento de Santa Coloma de Gramanet (Barcelona), Hispanujo.


La Revuo (1906-14), 800 DM; **Sennaciulo (1946-70)**, 250 DM vendeblaj: Hauptenthal, Kantstr. 50, D-6602 Dudweiler.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

KORESPONDEMULOJ

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!



BALDAŬ VENOS LA NOVA JARO
 — Por ĉiuj membroj kaj abonantoj, escepte de la dumvivaj membroj, estas la tempo pagi kotizon. Ĉiuj jarkotizoj pagitaj validas ĝis la fino de la kalendara jaro.

Kristalojn **Mineralojn**
 ĉiuspecajn el la tuta mondo mi deziras aĉeti daŭre. Aŭ rekte el minejoj aŭ tutaj kolektoj.
 Skribu al: Harry Borchert (Mineraloj), D-3392 Clausthal-Zellerfeld, Adolf Römerstr. 17, F. R. Germanujo.

Sendu poŝtkarton al Turku, vi povas gajni belan pupon!
 Pro nia kutima aŭtuna festotago, La Tago de Turku, ni aranĝas nun konkurson por la tuta esperantistaro en la mondo! Vi devas nur sendi poŝtkarton al la adreso: **LA TAGO DE TURKU, Box 66, SF-20100 TURKU 10, Finnlando**. Inter la senditaj kartoj oni lotumos dek belegajn pupojn. La kartoj devas esti en Turku antaŭ la fino de oktobro — 31.10.1971. Sendu vian karton tuj, jam hodiaŭ!
URBA TURISTA OFICEJO
 Turku, Finnlando

Ĉu vi jam legis?
IMPERATIVOJ DE LA VIVO de H. Rohden
 Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras la vojon al paco kaj feliĉo.
 Ĉe Libroservo de UEA — 2,70 gld.

Nepre legotaj: LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO
La Libro de la Spiritoj — La Libro de la Mediumoj
 La vera vojo al la spirita vivo, al la vera kristanismo.
 Eldonis: Federação Espírita Brasileira — Brazilo.
 Mendebla ĉe Libroservo de U.E.A.

Abonu al la fondita en 1964
BIBLIA REVUO
 Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj
 (ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)
 Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.
Varbu membrojn al la fondita en 1967
I. A. B. O.
"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"
 faka kunlaboranta asocio de UEA
 (aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)
Donu vian apogon al la fondita en 1968
EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO
 por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj
Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
 Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
 Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

APARTAMENTOJ "LA GOLETA"
DENIA (Alicante), Hispanujo
Novaj konstruaĵoj: Konsistas el 2 blokoj de po 16 apartamentoj. Ĉiu havas teretaĝon kaj tri pluajn etaĝojn. Ili situas en tre trankvila loko, inter oranĝarboj. Je 200 metroj de bona strando el subtila sablo. Je 4 kmj de Denia, kun tre bonaj alireblecoj. Granda ĝardeno kaj infanludejo. (2 500 m²). Individua numerita aŭtoparkejo. Agradebla temperaturo. Suno, 323 tagojn dum la jaro. Modernaj amuzejoj.
ECARO:
 — Salono-manjejo; du dultaj dormoĉambroj; banejo; kuirejo.
 — Vastaj terasoj kun bela vido al la maro
 — Kaheloj ĝis la plafano en banĉambro kaj kuirejo
 — Marmorkonglomerataj plankoj poluritaj
 — Unuaklasa sanitara materialo
 — Kompleta kuirejo kun unuakvalitaj ŝrankoj
 — Varma akvo, ĉie, kie necese
 — Tre prizorgita konstruo
 — Kolektiva televida anteno
PREZO: 400 000 pesetoj (5 800 dol.)
KONDIĈOJ:
 — 50 000 ptj (725 dol.) tuj ĉe la subskribo de la kontrakto
 — 150 000 ptj (2 174 dol.), ĉe la transdono de la ŝlosiloj
 — La resto: ĝis 6 monatoj, sen interezo
 ĝis 24 monatoj kun interezo laŭ banka normo.

 Profitu per luigado de la apartamento en la tempo, dum kiu vi ne uzas ĝin.

 Iniciatoroj: A. MARSAL kaj S. CONTRI
 Calle Generalísimo, 40 — 1º
 telefonoj: 780255 kaj 781338
 Denia (Alicante), Hispanujo.

Disko-kurso por komencantoj

Kvar longedaŭraj diskoj kun kompletaj tekstoj en akompana lernolibro. Allogaj, amuzaj kaj instruaj dialogoj el la ĉiutaga vivo. La voĉoj estas tiuj de la kontaj geparolistoj de Pola Radio. Verkis la kurson Andrzej Pettyn, aŭtoro de pluraj lernolibroj naciaj kaj internaciaj.

Diskoj: 4 diskoj en apartaj kovertoj, 33 t/m., 25 cm Ø, duflankaj, monofonaj.

Lernolibro: dulingva (Esperanta kaj pola), 21 cm. alta, ilustrita, 317 p.

Jam la dua eldono!



Ĉi tiu elstara kurso estas uzebla en ĉiuj landoj por lernantoj, kiuj jam studas la gramatikon de la lingvo sed bezonas ekzercadon en la elparolo kaj konversacio. La diskoj enhavas sole nur esperantlingvan parolon, dum ĉiuj parolitaj tekstoj troviĝas en Esperanto en la akompana pollingva lernolibro. Por la internacia uzo, la diskoj ne formas en si mem sendependan kurson, sed estu rigardataj kiel ekzerca materialo. La kompleto el kvar diskoj kaj akompana libro estas nun mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Prezoj: por Nederlando 50,73 gld.; por ĉiuj aliaj landoj 44,50 gld. Al tiuj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Krome, kiu deziras per registrita poŝto, bv. aldoni 1,25 gld.

Ĉu vi parolas Esperante?